
# KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto




*Simbolo n-ro 1 - La spirito de Dio super la akvoj*

N-ro 1, 2022

Esperanto

# Enhavo

Klarigo al simbolo n-ro 1 - La impulsoj de la kreoprincipo - de Martinus........................................2
Gardanĝeloj en la servo de la nacio - Parto 1 el 3 – de Martinus ......................................................4
La Terglobo - vivanta estulo - Parto 2 el 3 – de Ole Therkelsen ......................................................8
Kosma konscio – de Martinus..........................................................................................................13
Notoj.................................................................................................................................................23
Eo-semajno en Martinus-Centro Klint, Danio ....................................................................................23

# Klarigo al simbolo n-ro 1 - La impulsoj de la kreoprincipo - de Martinus

Vidu la plenan klarigon en La Eterna Mondbildo 1 kaj Livets Bog 1

### Resumo de klarigo pri simbolo n-ro 1 en La Eterna Mondbildo 1

*La simbolo kiu montru ke estas konscio malantaŭ ĉiuj kreaj procezoj de la naturo kaj la universo, estas tute mallonge klarigita de Martinus kiel simbolo n-ro 1 sub la titolo La spirito de Dio super la akvoj. La temon "impulsoj de la kreoprincipo" lige al la nuna evoluo de la terglobo Martinus plej detale pritraktis lige al la sama simbolo, sub la titolo La impulsoj de la kreoprincipo en LB1 par. 66.*

La simbolo montras ke estas konscio malantaŭ ĉiuj kreaj procezoj de la naturo kaj la universo. La supra lumcentro, kiu ellasas la radiojn, simbolas la dion aŭ la kreantan "Ion" en la universo. Supre en la simbolo la kreoprincipo estas esprimita per lumanta korpo kaj markita per la flamanta kruco, kiu ĉie en la verko de Martinus estas la signo aŭ rekonilo de la kreoprincipo. La radiaro montras la ĉiopenetran kreantan spiriton, konscion, volon kaj ĉiopovon. La ringoformaj radiaj formacioj kiuj disetendiĝas, estas la esprimoj de la mondaj impulsoj kiuj survoje tra la universo pasas la homarojn de grandaj kaj de malgrandaj planedoj. La multaj cirkloj simbolas la planedojn de la universo kaj la konscian vivon de la vivantaj estuloj ligitaj al ili. La duobla cirklo simbolas la terglobon kaj ĝian homaron. Ĝi estas en kontakto kun tri mondaj impulsoj.

La malsupra, malhele haĉita, montras la impulson kiu stimulis la konscian vivon de primitivaj homoj kun la mortiga principo de venĝo kaj reprezaliado. – La meza montras la malnovan mondan impulson kiu formas la bazon de la humanaj mondaj religioj, ekzemple kristanismo, islamo kaj budhismo. – La supra tria impulso montras la pli helan kaj novan mondan impulson, kiu nun niatempe estas naskata sur la teron kaj iom post iom malnecesigos la religojn kaj ĉiujn kredformojn, ĉar ĝi klarigos la religian aŭ realan flankon de la vivo kiel absolutan sciencon.

La ŝlosila vorto de la religia “malnova monda impulso” estas *kredo,* dum la “nova monda impulso” karakteriziĝas per *scio* aŭ *scienco.*

Tute nova inspiro kaj idearo niatempe disvastiĝas sur la teron danke al la nova monda impulso, kiu estas esprimo de makrokosma krea impulso.

Elĉerpo de La Eterna Mondbildo 1, simbolo n-ro 1, *La spirito de Dio super la akvoj.*

## La impulsoj de la kreoprincipo en Livets Bog: Mondimpulsoj. La signo aŭ rekonilo de la kreoprincipo en Livets Bog. Bildo de la rilato de la tera homaro al la kreoimpulsoj

***66.*** Kiel ni traktis en la antaŭa teksto, la kreoprincipo aktiviĝas en impulsoj de tre malsamaj dimensioj. Ĝi sekve aktiviĝas en impulsoj konformaj al makrokosmaj estuloj kiel ankaŭ en impulsoj konformaj al mikrokosmaj estuloj. Kaj al tiuj, kiuj konformas al la homaro, ni do donis la nomon *“mondimpulsoj”*. En simbolo n-ro 2 ni vidas materiajn signojn de la rilato de la tera homaro al tiuj mondimpulsoj. Ni do imagu la plenan simbolon kiel signon de parto de la universo mem. En tio kiel neskuebla bazo por ĉia kontrastformado aŭ kreado de interkontraŭoj kaj sekve kiel kondiĉa ĉefa faktoro en ĉia formo de travivado de la vivo aperas la kreoprincipo. Supre en la simbolo tiu principo estas indikita per luma korpo en formo de flama kruco, la signo aŭ rekonilo de la kreoprincipo ĉie en Livets Bog. De tiu luma korpo ni vidas kelkajn ringformajn radiformaciojn vastiĝi. Ili simbolas la mondimpulsojn. Sur sia vojo tra la universo ili pasas tra homarojn de grandaj kaj de malgrandaj mondoj. En la simbolo tiuj estas montritaj per grandaj kaj malgrandaj cirkloj. Proksimume meze en la bildo troviĝas cirklo kun duobla horizonta linio. Ĝi indikas la homaron de la terglobo. En la simbolo ni krome vidas, ke tra tiun homaron pasas tri impulsoj, nome unu, kiu malsupre estas tute malaperanta de la menciita homaro, kaj unu, kiu ankoraŭ preskaŭ tute regas aŭ plenigas ĝin, kaj unu supre, kiu komencas influi. El tiuj la unua estas bazo por religioj kaj dikultado de la primitivaj naturhomoj, dum la dua indikas tiun impulson, de kiu la budhismo, islamo kaj kristanismo iom post iom deiris, kaj kiu en Livets Bog estas karakterizita kiel *“la malnovan mondimpulson”*. Sed la tria indikas *“la novan mondimpulson”*, kiu en nia tempo estas tre forte naskiĝanta sur la tero. Ĉi tie ni do ricevas firme koncentritan bildon de la rilato de la tera homaro al la kreoimpulsoj.

## Aliaj homaroj kaj la nova mondimpulso

***67.*** Kiel tiuj mondimpulsoj regas kaj reguligas la konscivivon kaj la animan vivon de la tera homaro, tiel ili estas ankaŭ la reguliga bazo por la spirita vivo de aliaj homaroj. Kaj en la simbolo ni sekve vidas ankaŭ, ke troviĝas homaroj, kiuj multe antaŭas al la tera homaro, kaj ankaŭ homaroj, kiuj multe malantaŭas al ĝi, aŭ kiuj troviĝas en la sama stadio. Tio do plue signifas, ke troviĝas homaroj, en kiuj antaŭ longe tiu nova impulso fariĝis fundamenta, kiun la tera homaro nur nun estas ricevonta, same kiel troviĝas homaroj, kiuj nur nun devas komenci ricevi tiun impulson, de kiu la tera homaro havas nur kelkajn restojn en formo de la primitivaj formoj de dikultado ĉe la naturhomoj.


## La simbolo kaj la makrokosmaj impulsoj. La kreoprincipo kiel kondiĉo por la eterna sento ĉe la individuo, ke ĝi ekzistas

***68.*** La simbolo estas uzebla por indiki ankaŭ la grandajn makrokosmajn kreoimpulsojn. Se ekzemple oni deziras, ke la simbolo devas indiki la “galaksiimpulsojn”, oni bezonas nur imagi la cirklojn kiel signojn de la unuopaj “galaksisocioj”. Se la simbolo devas indiki la “sunimpulsojn”, do similmaniere oni konsideru la cirklojn signoj de la “sunsocioj”, same kiel oni konsideru la cirklojn signoj de la “planedosocioj”, se oni deziras, ke la simbolo estu signo de la “planedoimpulsoj”. Sed ĉi tie oni kompreneble komprenu, ke tiam la impulsoj estu konsiderataj tiel dimensiaj, ke en ili la antaŭe menciitaj “mondimpulsoj” malaperas kiel nevideblaj aŭ mikroskopaj detaloj.

Ĉi tie ni do vidis, *ke en sia tuta dia apero la kreoprincipo ne estas realaĵo limigita de tempo,*

*spaco kaj evoluo, sed libere disvolviĝas tra la tuta universo en makro- kiel ankaŭ mikrokosmaj formoj kaj detaloj, per kio pro sia speciala naturo kiel bazo por ĉia konscivivo ĝi estas kondiĉo por tiu eterna sento de la individuo, ke ĝi ekzistas.*

Vidu la du klarigoj en La Eterna Mondbildo, ĉapitro 1, kaj Livets Bog 1, §§ 66-68
*Simbolo n-ro 1 © Martinus Institut 1981*



# Gardanĝeloj en la servo de la nacio - Parto 1 el 3 – de Martinus

## 1. Spiritaj kaj fizikaj estuloj

Flanke de la videblaj vivaj estuloj en la fizika sfero ekzistas tuta serio da nevideblaj vivaj estuloj. Tial ni pri tiuj estuloj diras, ke ili vivas en alia sfero, la tiel nomata "spirita sfero". Tial ni nomas tiujn estulojn "spiritoj". La diferenco inter tiuj spiritaj estuloj kaj la fizikaj estuloj estas, ke la fizikaj estuloj estas ligitaj al kombino de diversaj solidaj kaj likvaj materioj en formo de fizika organismo, dum la spiritaj estuloj ne plu havas tian organismon. Sed absolute ĉiuj ekzistantaj spiritoj antaŭ pli aŭ malpli longa tempo havis fizikan organismon. Neniu estulo povas esti spirito, povas esti viva estulo sen enkarniĝo en fizika materio, same kiel neniu ajn estulo povas esti fizika estulo sen, ke ĝi malantaŭ la fizika organismo ekzistu kiel "spirito".

## 2. La spirito en la organfunkcioj de la universo

Se ni rigardas fizikan organismon, ĝi montriĝas kiel iaspeca universo. Same kiel la granda universo enhavas multajn diversspecajn fenomenojn, planedojn, sunojn, galaksiojn kun miriadoj da diversaj formoj de movo, kiu estas esprimo de logika kreado kaj per tio esprimo de vivo kaj konscio, de penso kaj volo, sekve la fizika organismo de la viva estulo ankaŭ enhavas serion da fenomenoj, kiuj ĉiuj kreas siajn formojn de logikaj aŭ utilaj specoj de movo kaj per tio esprimas vivon, konscion, penson kaj volon. En la konataj organismoj de vivaj estuloj, kio signifas la estuloj en "mezkosmo", ni ne kutimas nomi tiujn fenomenojn sunoj kaj galaksioj, sed ni konas ilin kiel organojn kaj organfunkciojn. Tial nia korfunkcio, pulmofunkcio, glandofunkcio kaj simile estas logikaj procezoj en la organismo, sen kiuj tiu ne povus pluekzisti aŭ esti tiu ilo por ni, kiu ĝi necese estu, por ke ni povu travivi la vivon en la fizika sfero sub tiu formo, kiu dum nia nuna evoluo- kaj sortoepoko estas vivkondiĉa por ni. Sed estus stulte kredi, ke ĉiuj grandaj fenomenoj ekstere en la universo, la procesoj de moviĝo de la naturo, ne same estas funkcio de organoj en granda organismo. Kio tio estus alie? – Kiam ĉiuj materikombinoj, kiujn ni kapablas kompreni per nia konscio, ne povas ekzisti sen esti organ- aŭ konscifunkcioj, kun kiu rajto aŭ sur kiu fundamento ni devus akcepti, ke la movspecoj ne havas la saman logikan celon en la grandaj materiokombinoj kaj movospecoj, kiujn ni per niaj fizikaj sensiloj povas trarigardi, kiujn ni ĝuste nomas la naturo, la stela mondo kaj galaksioj? –

Ĉu ne jam antaŭlonge fariĝis fakto, ke nia tuta fizika vivo ĉi tie sur la tero estas tute kreita per kunlaboro inter la suno kaj nia tero? – Kiel tiu vivo kaj tiu apero, kiun ni nun reprezentas, povus esti kreita kaj konservita sen la lumo kaj varmo de la suno? – La tero hodiaŭ estus glacia dezerto envolvita en la plej malluma nokto, sfero de purgatorio por provizore perditaj animoj. Sed kiam tiuj planedoj kaj steloj, sunoj kaj galaksioj tiel kreas tiujn necesajn kondiĉojn por la vivo, tiuj ja ankaŭ estas organfunkcioj. Kaj kial ili ne estus tiaj? – Estus nelogike kaj plej altgrade stulte kredi, ke la kolosaj fortoj, kiujn la sunoj kaj galaksioj reprezentas, dum milionoj kaj denove milionoj da jaroj devus ŝvebi tra la grandega spaco sen iu ajn utilo, kiam ni ĉi tie sur la tero ne povas preni guton da marĉakvo, sen ke ĝi estu tutplena de vivformoj. Kial tia abundo de vivo en malgranda guto se la planedoj, sunoj kaj galaksioj de la universo tiel multoblaj, ja nenombreblaj kiel la sableroj ĉe la marbordo, estus neloĝataj de fizikaj estuloj, estus neloĝataj de spiritoj aŭ de psikaj vivoformoj?

## 3. La mio kaj la spirito malantaŭ la organismo

La venonta vera kaj plej altranga scienco fariĝos la scienco pri la psika aŭ spirita flanko de la vivo mem. Tial oni spertos, ke la tuta universo estas traradiata de spirito, kiu ja estas la samo kiel vivo kaj konscio kaj sekve de penso kaj volo, avido kaj kontentiĝo de avido. Oni spertos, ke ne estas la vivo, kiu estas kunligita kun la fizika organismo, sed nepre estas inverse. Estas la fizika organismo, kiu estas ligita al la vivo. La vivo en si mem estas eterna, dum la organismo kun ĝiaj specialaj fenomenoj nur estas provizora, nur estas portempa. Kaj de nia propra vivfunkcio ni ja konas, kiel ni per propra penso kaj volo regas nian manifestadon kaj nian fizikan korpon. Ke ne estas la cerbo, kiu prizorgas tiun regadon, ĉiu honesta, intelekta, kosma esploristo scias. Tut certe la cerbo estas la granda ĉefilo, la granda sendilo kaj ricevilo de la forto de la volo. Tiu do nur estas ilo, sed por kiu? – Jes, iu fizika estulo ne povas esti, ĉar ĉio, kio alie ekzistas en tiu ĉi organismo, same nur estas subordigitaj iloj por la sama reganta io. Tiu io do estas la estiganto de la organismo. Sed ĉar tio ĉi ne ekzistas en la fizika sfero, sekve do estas psika estulo, kio estas la samo kiel "spirito". Malantaŭ ĉiu fizika organismo, ĉu planedo aŭ astro, ĉu ordinare konata organismo de karno kaj sango, ekzistas do reganta spirito. Kaj sekve malantaŭ la fizika apero de la terglobo ekzistas reganta spirito, kiu estas la plej alta aŭtoritato de la tuta terglobo. Sed spirito ne nur konsistas el spirito. Spirito laŭlitere estas penso kaj volo, kiu denove estas la samo kiel konscio, kaj konscio estas siavice io kio estas subordigita estiganto, pro tio ke ĝi estas spertata kaj manifestata. Tiu ĉi spertanta kaj manifestanta io estas tio, kion ni lernis rekoni kiel la mio. La mio kombinita kun penso kaj volo aŭ konscio konsistigas spiriton, kiu alivorte estas viva psika estulo.

## 4. Diktaturo en kontakto kun la konscio, avido kaj volo de la tergloba mio

La plej alta aŭtoritato en la regiono de la tero sekve estas la mio de la terglobo. Ĉiuj aliaj potencfaktoroj en ĝia regiono, kiel la konataj grandpotencaj nacioj, sekve ne estas la plej alta aŭtoritato sur la tero. La tergloba mio kun sia spirito estas la absolute suverena aŭ reala reĝo de la tuta terglobo. Ĉu grandpotenca nacio falu, aŭ ĉu ĝi kresku, ĉu raso evoluu en iu aŭ alia direkto, ĉu landlimoj estu tie aŭ ĉi tie, ĉu la nacioj unuiĝu al unu mondo, aŭ ĉu ili restu dividitaj en kontraŭaj ŝtatoj kaj per tio estu daŭra fonto de milito kaj malpaco inter la homoj, tio estas demando, kiu sole povas esti solvita de la vera reĝo de la tero, la spirito de la tero aŭ la termio. Kaj fakte estis tiu ĉi mio de la tero aŭ la spirito de la tero kiu en la pratempo okupis la diktaturajn reĝojn. Kiam oni diris, ke ili estas filoj de Dio aŭ parencoj de Dio mem, reale estis la spirito de la tero, kiu estis plej proksima al ili. Ili tiel estis centroj de la fizikaj talentokernoj de la tero. Per tiuj reĝoj la termio povis reguli siajn mikroestulojn, kio ĉi tie signifas la fizikan kaj spiritan direkton de la homaro. Per tiuj talentokernoj la termio elsendis sian volon, kiu per la menciitaj kernoj estis transformitaj al organizanta diktaturo. La reĝa estulo ja diferencis de la ordinaraj estuloj per tio, ke li estis "inicita" estulo, kio signifas estulon kun tiom progresinta evoluo, ke la termio povis sendi sian volforton rekte tra tiu estulo. La diktaturo kiu tiamaniere estis praktikata altgrade estis en kontakto kun la volo, avido kaj sopiroj de la termio. La ceteraj homoj en tiu regno, kiu estis subordigitaj de la reĝoj, ja estis nesciantaj estuloj, kiuj ne povis rekte ricevi altajn spiritajn impulsojn de la spirito de la termio. Tial ili nur povis esti organizitaj kaj metitaj en evoluo per la intelekta diktaturo. La reĝoj tiel estis la solaj estuloj kun psiko, kiu rekte povis ricevi la impulsojn de la termio.

Sed iom post iom la mikroindividuoj de la tera spirito fariĝis pli kaj pli evoluintaj, komencis esti intelektaj, kaj la homoj komencis esti kunpensantaj kaj ekhavis la samajn kapablojn kiel la reĝoj. Tiel ankaŭ ili estiĝis talentokernoj por avido, konscio kaj volo de la tera mio. Sed kiam la unuopaj estuloj tiel pli kaj pli evoluis kaj komencis mem pripensi, ekhavis novajn pensojn, kiuj kelkfoje estis pli progresintajn ol tiuj de la reĝo, tiam la diktaturo aŭ la reĝa potenco komencis estis sentata kiel kaptanta ligilo. Estiĝis malobeado kaj ribelado kontraŭ la reĝopotenco. Revolucioj aŭ provoj forigi la reĝopotencon avantaĝe al aliaj formoj de regado komenciĝis. Sed samtempe kiam la estuloj tiel unu post la alia akiris pli da konscio, tiam estiĝis ankaŭ rivaleco pri la reĝa potenco. Gloramo kaj potencavido ja estas la unua, kiu manifestiĝas, kiam la primitiva homo komencas ekhavi kulturan evoluon. Ĉiuj volas esti malgranda reĝo, por ne diri malgranda dio. Kaj sekve aperis laŭ la evoluo pli kaj pli da maltrankvilo inter la terhomoj aŭ la plej altrangaj mikroindividuoj de la terospirito. Ni ja vidis, kiel tiu evoluo daŭre okazis tra jarcentoj kaj kreis pli kaj pli grandan malpacon, kaj samtempe la estuloj progresis rilate al teknika kaj kemia scio kaj kapablo.

## 5. Kial la termio permesas militojn kaj revoluciojn

Nun oni eble demandas: kial la termio ne agas kaj malebligas tiujn militojn kaj revoluciojn? – Kial ĝi ne haltigas tian tutan kataklismon en ĝia propra organismo? – La respondo ĉi tie estas tiu, ke ĝi vere agas por reordigi sian organismon. Ja tre klare videblas, kiel ĝia penso kaj volo okupas la plej eminentajn talentokernojn por ĝiaj impulsoj. Ni hodiaŭ vidas kelkajn estulojn, kiuj ricevis potencon, kiu neniam antaŭe estis donita al iu unuopa estulo sur la globo. Ĉu ni ne hodiaŭ vidas kelkajn unuopajn estulojn, por ne diri unuopa viro, kiu regas cent milionojn da homoj tute diktature? – Kaj ĉu ne tra la propagando kaj agitado ĉirkaŭe en la landoj, aspektas tiel, ke la celo de tiu diktaturo ne estas malpli ol la regado de la tuta mondo? – Flanke de tiu potencgrupo ekzistas alia potencgrupo, kiu ankaŭ alĉelas unuiĝon de ĉiuj popoloj sur la tero al *unu* popolo, al *unu* regno kaj *unu* mondo. Sed ĉi tie ne estas la diktatura principo, kie la individuo estas sklavo, kiu estas la celo. Ĉi tie estas formo de regado, en kiu ĉiuj povas partopreni, formo de regado, en kiu ne nur ke ĉiu havos voĉrajton, sed ankaŭ la rajton kritiki tiel, ke eventualaj maljustecoj aŭ misago de la registaro povas esti publikigitaj kaj konfirmitaj kaj per tio kontraŭbatalitaj. Ĉi tiuj du tendencoj tiom disvastiĝis, ke ili nun koncentras la homojn en du grandaj grupoj, la unua por diktaturo kaj per tio por forrabi la liberecon de la homoj avantaĝe al la potenculoj, kaj la alia por demokratio kaj per tio por la plej granda protekto de la libereco de la individuo avantaĝe al intelekta evoluo kaj kreado de kulturo. Sekve la homaro hodiaŭ estas dividitaj en du kontrastaj grupoj, kio necese ŝargas la atmosferon kun

streĉo, timo de milito kaj fortegaj esprimoj de interna opozicio kaj netoleremo. Kaj ĉar la homoj ordinare tute ne komprenas, kio okazas, ili supozas, ke estas tiu aŭ tiu diktatoro aŭ tiu aŭ tiu eminenta demokrato, kiu kaŭzas la situaciojn. Kaj oni do juĝas laŭ tio. Ĉu ne laŭ tio oni juĝis Lenin, Stalin, Hitler kaj Mussolini, kaj ĉu ne laŭ tio oni juĝas Roosevelt kaj Truman? – Ĉu ne oni opinias, ke estas tiuj homoj, kiuj decidis aŭ decidas la evoluon de la mondo? – Sed io pli naiva ne estas imagebla. Ili ne havas la plej malgrandan influon de la sorto de la homaro. Tio estas io por si mem. Se ne tiuj homoj estus en la fronto de la specialaj fortoj, tuj estus aliaj kun precize sama psiko aŭ tipo de menso. La okazinta situacio estis kaj estas tute neevitebla. La menciitaj estuloj nur estas talentokernoj por la konsciimpulsoj de la termio. Ĉar ja estas la sama mio, la sama estulo, la sama reĝo malantaŭ la du kontraŭaj potencgrupoj, kiuj hodiaŭ aspektas tiom minace por la monda paco, nome la termio aŭ la spirito de la tero. Tio estas la volimpulsoj de la terglobo, ĝia moralserĉado, ĝia pensado antaŭen kaj reen pri tio, kion ĝi devas kaj ne devas fari.

## 6. La tero konfrontas sin mem kun sia pensomondo kaj morala sinteno

Kiel eblas, ke la tero havas tiajn du ŝajne ĉiondetruantajn kontraŭajn impulsojn? – Jes, kial ĝi ne kiel ĉiu alia viva estulo devus stari antaŭ la du grandaj kontrastoj. Tio, kion ĝi scias kaj tio, kion ĝi ne scias. La tera spirito ja estas viva estulo, kiu estas submetita al la spiralciklo, kaj sekve situas en ia loko en tiu ciklo. Kaj ne estas malfacile vidi, ke ĝi troviĝas sur la sama loko kiel la progresanta ordinara tera homo en sia spiralo, kio ja estas sur la limo inter “besto” kaj homo, kio same estas sur la limo inter egoismo kaj altruismo, inter amo al si mem kaj amo al la proksimulo. Kiam ĝi situas en tiu sfero en sia spiralciklo, ĝia konscio parte estas influata de bestaj aŭ egoismaj pensoklimatoj aŭ spiritaj fortoj kaj parte de la fortoj de humaneco kaj spiritaj fortoj de la amo al la proksimulo. Kiam ĝia konscio estas trafluita de tiaj fortoj, tiam la samaj fortoj memkompreneble kontrolas la konformajn talentokernojn. Kaj sekve oni do fariĝas okupata de la egoismaj aŭ bestaj spiritfortoj de la termio samgrade, kiel oni mem estas egoisma kaj potencavida kaj malama rilate al la proksimulo, sammaniere kiel oni fariĝas okupata de la altruisma humana aŭ amoplena tendenco aŭ energio de la termio samgrade, kiel oni estas taŭga talentokerno por tiuj fortoj. Sekve ni vidas, ke la “grandaj viroj” en la mondpolitiko reale nur estas okupitaj de la impulsoj de la termio de tiu speco, kun kiuj ili mem plej multe simpatias dum sia ĉiutaga vivo. Sed kiam en la terpsiko aŭ termenso tiel aperas du kontraŭaj fortoj, kiuj persekutas unu la alian, tio do signifas, ke la tera spirito estas esploranta sin mem, sian propran pensomondon, sian moralan sintenon. Kaj dum tiu esplorado estas klare, ke ĝi kolektas ĉion, kio povas paroli por la egoismo kaj la diktaturo aŭ forrabo de la libereco de la unuopa individuo avantaĝe al la amaso, same kiel ĝi kompreneble volas kolekti ĉion, kiu parolas avantaĝe por la libereco kaj protekto de la unuopa individuo kontraŭ la amaso aŭ la ŝtato, protekto kaj vastigo de la amo al la proksimulo. Tiel la tero momente pripensas. Ĉar ĝi estas de tute alia tempociklo ol la mikrociklo, en kiu ni mem vivas, ĝia “pensotempo” estas multe pli longa tempospaco ol la nia. Kio estas sekundo por la terestulo, tio eble estas jaro aŭ dek jaroj aŭ jarcento por ni. Tial ni komprenas, kaj la pensfunkcioj de la tero, ĝiaj ŝanĝantaj sintenoj, trapasas la homaron kiel ties kulturepokoj. La tero do estas en krizo, nepre tiu krizo kiu ĉiam antaŭeniras la iniciĝon. La terglobo komencis la spiritan proceson jam antaŭ jarcentoj kaj estos preta post tri mil jaroj, do ne estas strange, ke ni sentas tiujn ĝiajn konsciimpulsojn tiom forte en nia propra sfero, ĉar ĝi ja estas okupita de la spirito de la tero.

Per tiu mapado de la terhoma psika sfero ne estas malfacile eltrovi, kio venkos en la mondo. Ĉar la reĝopotenco aŭ la moderna diktaturo, la manko de amo kaj la forrabo de la libereco estas io, kio jam estas elĉerpita, ĝi falos kiel tiu velkinta kulturepoko, kiu ĝi reale estas, kaj venkos la novaj demokrataj impulsoj. Pli kaj pli da homoj aŭ talentokernoj por tiuj impulsoj estos okupataj de la plej altaj konsciimpulsoj de la terospirito, kiuj estos manifestitaj per vortoj kaj agoj en la materia sfero. Estas talentokernoj de tiu speco, kiujn ni konas kiel mondliberigantojn, la grandajn humanistojn kaj kulturkreantojn, kio prenos formon kiel spirita scienco.

*La originala dana artikolo ”Skytsengle i nationens tjeneste” aperis en dana Kosmos, n-ro 1/1998. Esperantigita de Ejnar Langkilde kaj Hokan Lundberg.*



# La Terglobo - vivanta estulo  - Parto 2 el 3 – de Ole Therkelsen

### 8. La homoj estas la cerboĉeloj de la planedo, kaj la tuta homaro estas ĝia cerba maso

Oni povas per pure fizikaj argumentoj multe pledi por la ideo ke la terglobo estas vivanta estulo. La specialaĵo de Martinus tamen ne estas natura scienco, sed scienco spirita, kaj tiurilate povas esti tre interese okupiĝi pri la demando: Kiajn pensojn havas la terglobo?

Komune inter ĉiuj vivantaj estuloj estas ke ili havas konscion, kie *konscio* laŭ sia plej larĝa difino laŭ Martinus estas *la kapablo sperti kaj agi.* Iunivele ĉiuj vivantaj estuloj havas konscian aktivecon. Ankaŭ la terglobo havas siajn konscion kaj pensadon, kiujn Martinus analizis plurloke en sia verkaro. (LB1, ĉap. 1-5, Kosmos n-roj 1, 2, 3/1998, Artikolaro 1, n-ro 40).

La plej evoluintaj ĉeloj de la tergloba estulo estas la homoj, kaj ili tiel fariĝas iaj cerbaj ĉeloj en la fizika organismo de la planedo. La substanco, el kiu konsistas la suma surtera homaro, do estas la cerba maso de la tero.

Tiuj grandaj civilizoj kun apartenantaj religioj kiuj pasadas sur la tero, tiel fariĝas la pensoj de la planedo. La civilizoj kiuj estis sur la tero estis esprimo de aparte inspiritaj pensoj, kaj ĉiuj militoj, konfliktoj kaj detruoj kiuj estis, esprimas negativajn aŭ primitivajn pensojn. Ĉiuj el la multaj religiaj, kulturaj, sciencaj kaj politikaj fluoj en la socio tiel fariĝas esprimoj de la pensado de la tergloba estulo.

En sia kosmologio Martinus priskribas ke, same kiel ekzistas homaj socioj, tiel ekzistas ankaŭ socioj de makrokosmaj estuloj en la formo de planedaj socioj kaj, en ankoraŭ pli granda formato, socioj de sunsistemoj kaj galaksioj ktp. (LB1 par. 58).

Tiamaniere estus ne tiel malfacile imagi ke la terglobo komunikadus per radiado kun aliaj vivantaj planedoj. Martinus indikas ke kiam nia planedo koleriĝas aŭ agaciĝas pri alia planedo, tio esprimiĝas kiel militoj ĉi tie sur la tero. Militoj tiel do estas sekvo de la terglobaj koleresprimoj direktitaj kontraŭ alia planedo. Sed kontraŭ kiu planedo aŭ tergloba ekvivalento estas direktitaj ĉi tiuj energi-ellasoj, tion Martinus tute ne priparolas. (La ideala nutraĵo, ĉap. 21).

Sed la homoj kaj sekve ankaŭ la tero mem ne povas ne suferi tre multe sekve de tiuj koleresprimoj, kiel ni vidis interalie en la formo de du mondaj militoj, dum kiuj estis mortigitaj multaj cerboĉeloj de la terglobo (homoj), dum aliaj estis kripligitaj aŭ vunditaj. Mallonge dirite, al la tero detruiĝis grandaj partoj de ĝia cerba maso. Simile, Martinus opinias ke ankaŭ la homo dum siaj troekscitiĝoj malordigas siajn mikroindividuojn kaj sian cerban mason.

Martinus: “La mondmilitoj rezultigos ke estos kreita mondo kun tutmonda registaro kaj kun kultura centro en Kaŭkazo, kie oni konstruos piramidon samstilan kun la piramido de Keopso, kie ĉiuj el la simboloj estos kolektitaj. Okazos alcentrigo de la produktada sistemo kaj de la distribua sistemo. Post tio aperos “miljara regno”, post kiu precipe temos pri ekstermado de la psikaj mallumaj fortoj – lasta elpurigo de la mentalito de la tero.” (Privata noto el ĵaŭda kunsido).

### 9. La rilato inter la mispensado de la homo kaj tiu de la terglobo

Kiel dirite oni povas pensi kaj agi malĝuste aŭ sename al la mikrovivo de sia organismo portante koleron aŭ aliajn negativajn pensospecojn. Ĉar la pensoj estas la plej alta natura forto en la

organismo, ili kreas la klimaton en kiu vivos la mikroestuloj. Kiam ajn la homoj do ne scias ĝuste pensi kaj ne scias kian respondecon ili ŝarĝas sur sin per la mispensado, ili ja devas tion lerni. La homoj tial troviĝas en la organismo de la tero, kie okazas multe da malharmonio, katastrofoj, kripligado kaj sufero. Sed tion saman ni ja atestas en la organismo mem de la nefinita homo. Kion homo semas en mikrokosmo, tion ĝi mem rikoltos en makrokosmo. (Vidu LB6 par. 2020).

Martinus: "La granda organismo en kiu la homoj troviĝas kiel "mikroestuloj" do laŭ sia naturo estas samkvalita al tiu de la tera homo. Tio siavice signifas ke ankaŭ tiu mio kiu havas la terglobon kiel organismon, pensas ne ĝuste. La pensenergio aŭ vivoforto de ĉi tiu estulo, identa al niaj "naturfortoj", do ankaŭ ne estas perfekta. Okazas naturkatastrofoj, inundoj, vulkanaj erupcioj, ciklonoj, mortigaj varmo kaj malvarmo, do malfaciligado de la vivkondiĉoj al ĝiaj "mikroindividuoj", inter kiuj estas la homoj." (Sepulto, ĉap. 100).

Ekhavinte kosman konscion Martinus klarigis ke li vidis lumajn kaj brilajn mondojn kun homaroj havantaj moralon kaj idealismon, kiuj treege superas la ĝeneralan teran moralon. Sed li ankaŭ vidis mondojn de multe pli malalta naturo kun barbareco kiu signifis ke la vivantaj estuloj devis mortigadi por mem vivi. Ĉi tio kaŭzis ke ĉi tiuj mondoj fariĝis scenejoj de disvolviĝo de malsaneco, malfeliĉo kaj mizero, funebro kaj sufero. (LB1 par. 21).

La sortostato de la teraj homoj estas tro evoluinta por ke ili povu enkarniĝi sur planedoj kun tiaj krudaj, primitivaj kaj barbaraj kondiĉoj. Sed aliflanke, se la nefinitaj homoj de la tero enkarniĝus sur planedo kie ĉio estus perfekta kaj en harmonio, ili tie estigus malharmonion kaj estus multe tro primitivaj mikroindividuoj.

La kosmaj leĝoj certigas ke ĉiu estulo enkarniĝos en makroindividuo kiu reprezentas la saman evolu-ŝtupon. Mikroindividuo tiel ricevas per sia ekstera mondo bildon de sia propra interna mondo. Martinus klarigas la sortoleĝon kiel *spegulan principon.* (LB4 par. 1262, LB6 par. 2128).

## 10. La terglobo havas malgrandan invalidecon

Martinus argumentas ke la terglobo havas malgrandan invalidecon pro ĝia dekliniĝo, kiu en la moderklimataj zonoj kulpas pri tiu granda diferenco inter vintro kaj somero, kiu kaŭzas al multaj el ĝiaj makroindividuoj grandajn malfacilaĵojn. Pro la aksa dekliniĝo la klimato fariĝas severa kun mallumo, malvarmo, frosto kaj neĝo iuloke kaj kun seko kaj varmo aliloke. La homoj devas konstrui domojn kun lumigo kaj hejto por protekti sin kontraŭ la malmildeco de la klimato. Rivolu-akso orta al la orbita plano signifus ke tago kaj nokto ĉiam estus samlongaj, kaj praktike ne estus malsamaj sezonoj. En iuj moderklimataj zonoj estus belega somero la tutan jaron.

Ke Martinus uzas la vorton invalideco estas pro tio ke la severa klimato estas granda ĝeno kaj malfacilaĵo al la mikroindividuoj kaj sekve al la planedo mem. La tergloba estulo mem respondecas pri tiu aksa dekliniĝo aŭ invalideco. Malperfektaĵoj en ĝia mentalito estas la kaŭzo de tiu sorto ke ĝi mem kaj multaj el ĝiaj mikroindividuoj devas suferi la vintrajn mallumon kaj malvarmon. La konstanta lukto de la homoj kontraŭ la konsekvencoj de la teraksa dekliniĝo tamen havis tiun avantaĝon ke ili evoluigis teknikon de tre alta kvalito, kaj povis per ĝi iagrade mildigi la sekvojn de la invalideco evoluigante artefaritajn lumon kaj varmon. La lulilo de la tekniko ne povis stari en la varmaj landoj, sed nur en landoj kie la homoj devis lukti kontraŭ la elementoj.

La terglobo, kiu ja estas organo de la sunsistemo, ricevas sian vivigan forton de la suno kaj tial estas en decida dependorilato al ĝi. Tial ne estas sensignife ke la rilato de la tero al la suno iamaniere eliĝis el sia natura irejo, kio altgrade malfaciligis la vivon al homoj en la malvarmaj landoj. (Vidu LB3 par. 658-660).

La tergloba estulo laŭ Martinus iam havis tro impetan mensan aktivadon aŭ troan aplikon de eksplodaj energioj en sia konscio, tiel ke ĝia rivolua akso deŝoviĝis kaŭzante gigantajn katastrofojn. Tiu kolereksplodo aŭ troekscitiĝo estis direktita al alia planedo, kaj la sekvoj de tiu tro forta energi-interŝanĝo kaŭzis la grandan katastrofon, pro kiu la terglobo kliniĝis el sia ĝusta irejo rilate al la suno. Martinus traktas nur la principon de la problemo, kaj li ne alprenas sintenon pri tio ĉu la tero efektive troproksimiĝis aŭ koliziis al alia astro.

## 11. La konscio de la terglobo respondecas pri la klimataj cirkonstancoj

La klimaton kaj la fizikajn vivkondiĉojn regas unuavice la turniĝado de la tero ĉirkaŭ sia akso kaj ĝia rondirado ĉirkaŭ la suno. Sed ĉar la terglobo estas estulo pensanta, evidente ĝiaj konscio kaj pensoj devas ankaŭ ludi decidan rolon en tiu aksa dekliniĝo kiu kaŭzis la tre specialajn klimatajn cirkonstancojn de la planedo.

Laŭ unu vidpunkto do kulpas pri la malfacilaj klimataj cirkonstancoj la tergloba estulo. Sed eĉ se la akso estus rektigita kaj estus sufiĉe da nutraĵo por ĉiuj, la homoj tamen ne ĉesus batali pri la alia sekso, daŭre estus proĵaluzaj dramoj kun murdoj kaj memmortigoj. Homoj daŭre klopodadus por ekhavi potencon kaj levi sin super aliajn kaj domini ilin. Necesas mentalita ŝanĝo por ke la homoj surteraj povu ekvivi en mondo en kiu estos ne bezonataj polico, justico, devigitaj profesioj, monopoligo de la valoroj.

Pro la nefinita mentalito de la terhomoj ili estas nature altirataj al planedo kun responda severa klimato. Ke la homoj ne vivas sur alia planedo en la universo, kie la cirkonstantoj ne estas malfaciligitaj de aksa dekliniĝo, do kaŭziĝas de tio ke la fizika kaj psika strukturo de la homo nature konformas al la stato de la terglobo, kaj de tio ke ili ĉi tie havas la eblecon evolui en la lukto kun la naturaj fortoj. Do la sortoformiĝo de la homoj mem estas tio kio kaŭzas ilian altiriĝon sur la terglobon. (La aksa dekliniĝo de la vivo, Kosmos n-ro 11/1987).

## 12. Ĉu la homoj daŭre devos suferi pro la aksa dekliniĝo de la tero?

Surbaze de la mekanika fiziko kun la Neŭtonaj leĝoj, la rivolua momanto de la terglobo kaj sekve ĝia aksa dekliniĝo ne ŝanĝiĝos dum la venontaj jarmilionoj, krom se ĝi tute neantaŭvidite submetiĝos al granda ekstera forto.

Martinus indikas ke al la homoj ne necesas ke la tera akso rektiĝu, ĉar per la evoluinta tekniko, domoj kun artefaritaj varmo kaj lumo ktp., ili venkis la ĝenojn de la dekliniĝo de la rivolua akso. Oni ne atendu ke la organismo de la tero, en la nuna enkarniĝo de la tera mio, estus trafota de tiel forta ŝoko ke ĝia akso subite remetiĝus en sian normalan pozicion, ortan al la orbita plano. Subita ŝanĝo de la aksa dekliniĝo kaŭzus gigantan katastrofon al la homoj.

Martinus: “Tia giganta katastrofo rilate al la tero ne plu povas okazi. Se la tera akso entute povos reveni al la vertikala pozicio en la orbita plano, tio povas okazi nur en maniero preskaŭ nerimarkebla al la mikroestuloj, maniero kiu bezonos jarmilionojn kaj pliajn jarmilionojn por sia plenumiĝo. Ĝia invalideco do iusence estas konstanta.” (LB3 par. 667).

Male la magnetaj norda kaj suda polusoj povos moviĝi sen menciindaj malagrablaĵoj al la homoj.

Same kiel la terglobo havas malfaciligan aksan dekliniĝon, ankaŭ la homoj sur la tero havas ian mensan aksan dekliniĝon, kiu ilin suferigas pro iliaj nefinitaj kaj primitivaj flankoj. Fanatikeco, netoleremo, malhonesteco kaj potencavido estas pensaj klimatoj kiuj kreas suferojn kaj malfacilajn vivkondiĉojn al la homo.

Martinus: “Tiel longe dum ankoraŭ estas homoj kiuj vivas en superfluo kaj disipado, dum aliaj malsatmortas, kaj tiel longe ke mensaj vulkanaj erupcioj furiozas inter nacioj kaj unuopaj homoj, la terhomoj suferas la rezultojn de sia mensa aksa dekliniĝo”. (La aksa dekliniĝo de la vivo, Kosmos n-ro 11/1987).

La intenco ne estas ke la teraj homoj plu suferadu la rezultojn de sia propra *mensa* aksa dekliniĝo; la demando nur estas kiel rektigi ĝin. – Ja, per la spirita scienco kiel helpilo al memhelpo ili iom post iom eskapos sian aksan dekliniĝon, laŭ Martinus. Grade ĉiam pli multaj el la cerboĉeloj de la terglobo evoluos ĝis ili atingos la mensan ekvilibron kiu povos ŝanĝi la fizikan teron al mondo de paco.

La nunan sorton de la homoj kreis la sopiroj, deziroj kaj avidoj de la pasinteco, kaj tial havas grandan signifon ankaŭ tio kion la unuopaj homoj sopiras, kaj kion ili faras por ke iliaj sopiroj iom post iom plenumiĝu.

La teraj homoj nun troviĝas sur ŝtupo de la evoluo kie ili komencas satiĝi rikoltinte la rezultojn de la egoismo. Ili estis altiritaj al la tergloba estulo ĉar ĝi estas makroestulo kies pensoj kaj volo estas agorditaj al la sama ondolongo, nome al la sopiro de paco, harmonio kaj amo.

## 13. Kaj la fizika kaj la kosma scienco profitigos la tutan homaron

La homoj kiuj vivis en regionoj kun la plena efektiviĝo de la kontrasta principo kun la kvar sezonoj, submetiĝis al forcita evoluo ĉar ili devis venki la naturajn fortojn. La homoj de la Okcidento tial evoluigis specialan konscion kun fokusiĝo pri la fizikaj aktivadoj kaj materiaj rilatoj. Poste montriĝis ke la materiismaj scienco kaj tekniko multe profitigis la tutan planedon. La homoj kiel profetite en Genezo "submetis al si la teron" laborigante por si la elementojn. Per nura premo de butono, oni povas laborigi por si milionojn da ĉevalfortoj.


Koncerne la kulturon de la Okcidento Martinus ankaŭ atentigis ke konforme al la plano por la evoluigo de la tero la penso de reenkarniĝo estis eligita el la kristanismo, ĉar la kristanaj landoj devis ekhavi materiisman vivkoncepton favore al la teknika evoluo, kiu necesis por la establo de internacia mondregno sur la tero. Sen la evoluigo de telefono, radio, televido, komputiloj, interreto, satelitoj, robotoj ktp. ne eblus atingi sukcesan administradon de tutmonde kombinita mastrumado en komplete justa maniero. La establo de telekomunikilaro kaj interreto ankaŭ estas rigardebla kiel evoluigo de tiuj nervaj fibroj en la tuttera cerbo, kiuj necesas por igi la tutteran cerbon funkcii optimume en la estonta mondregno. Tio ne estus farebla sen la evoluigo de la materiismaj scienco kaj tekniko. Kaj la inventoj kiujn ni hodiaŭ vidis, estas nur komenceto, la estonteco prezentos la plej nekredeblajn inventojn je ĝojo kaj utilo por la homoj. – La maŝinoj estas niaj amikoj!

Ĉio tio ne signifas ke la kulturo de la Okcidento estas supera al tiu de la Oriento, sed signifas ke iuj evolu-faktoroj necesaj al la plua evoluigo de la homaro dum iu periodo koncentriĝis al tiuj lokoj de la tero kie ĉeestis la kondiĉoj por evoluigi tiujn aferojn.

La materialismo kaj ateismo regantaj en la Okcidento altgrade disvastiĝos al la Oriento kaj sur la tutan terglobon. Sed tiu impulso de la Okcidento kiu fekundigos la kulturon de la Oriento, konsistos ne nur el la materialisma scienco, sed ankaŭ el la kosma aŭ spirita scienco, kiu ĝuste kapablos unuigi la materialisman sciencon kun la grandaj veroj kiuj kaŝiĝas en la religia mistiko de la Oriento. (Vidu eventuale Kosmos n-ro 1/1995).

## La du mensoj de la homo

M*artinus ofte uzis ĉi tiun simbol-desegnaĵon en siaj prelegoj, klarigante ke la tera homo estas duone besto kaj duone homo. Desegnaĵo de Hans Henning Withus (1920-1947).*




**La terhomaj du mensoj**
***Desegnaĵo de Withus***
***Tradukita de Jonas Dalmose***

## 14. La mio kaj la konscio de la tergloba estulo regas la iradon de la tera evoluo

Malantaŭ ĉiu fizika organismo troviĝas direktanta konscio, kaj tiel ankaŭ malantaŭ la terglobo troviĝas direktanta konscio kiu estas la plej alta aŭtoritato de la tuta planedo. Kune kun la mio la konscio konsistigas la direktantan kaj vivan parton de la vivanta estulo.

Laŭ Martinus la plej alta aŭtoritato en la areo de la tuta tero ĝuste estas la mio de la terglobo, kaj ne kiel multaj kredas, la diversaj grandpotencoj aŭ ŝtatestroj. Ĉu iu grandpotenco falu aŭ avanciĝu, ĉu landlimoj estu lokitaj tie aŭ aliloke, tion decidas ekskluzive la tera mio kaj ties konscio. (Vidu Kosmos n-ro 1/1998).

Antaŭe la faraonoj kaj reĝoj estis tiuj plej proksimaj al la terspirito aŭ la tera konscio, kaj ili do estis iaj fizikaj talentonukleoj de la tera mio, kiu per ili povis reguligadi la fizikan kaj spiritan kurson de la mikroestuloj aŭ homoj. Per tiuj talentonukleoj la tera mio povis disvolvi sian volon per la aŭtokratio aŭ diktaturo de la reĝoj. La reĝaj personoj estis iagrade inicitaj kaj tial estis speciale taŭgaj por ricevi impulsojn de la tera mio. Lastajn restaĵojn de tio ni trovas interalie en la dana titolo "reĝo laŭ graco de Dio".

Dum la homoj evoluigis la inteligenton kaj la memstaran pensadon, la diktaturo aŭ reĝa potenco komencis fali pro ribeloj kaj revolucioj, kaj ekestis aliaj regformoj en kiuj la unuopaj individuoj danke al pli alta evoluŝtupo ricevis pli da influo.

Ne gvidantoj kiel Lenin, Stalin, Hitler, Churchill aŭ Roosevelt decidadis la iradon de la mondo. Ili estis akceptantoj aŭ talentonukleoj de la konsci-impulsoj de la tera mio, sed la evoluon regas la tera mio, kaj ankaŭ ĝi elektas kaj forigas la diversajn ŝtatestrojn kiam tio plej konformas al la evoluo de la terglobo. (Kosmos n-roj 1/1998 kaj 8/2010).



Foto NASA

# Kosma konscio – de Martinus

## 1. Kosma konscio kaj la kreado de la lumo fare de Dio

Antaŭ preskaŭ du mil jaroj sonis la promeso de la anĝeloj pri "paco sur la tero". Sed paco sur la tero ne estas simpla afero. Ĝi ne estas mirakle kreebla en la daŭro de momento sed postulas jarmilojn, eĉ milionojn da jaroj fariĝi tiu totala dia beno, por kiu ĝi en si mem estas destinita en la dia mondaranĝo. La vera "paco" nome estas la samo kiel "kosma konscio".

Kio do estas "kosma konscio"? – "Kosma konscio" estas la samo kiel la rezulto de renkontiĝo kun kaj kunfandiĝo de iu en la individuo enestanta altira forto direktita al la ekstera naturo kaj ĉirkaŭaĵo kaj de iu el tiu naturo reefika forto, kiu superombras la individuon. En la Biblio tiu en la individuo kaj en la naturo enestanta reciproke altira forto estas esprimita kiel la ordono de la Providenco aŭ Dio: "Estu lumo". Sekve tiu lumo estis la plej unua stadio de la kreado kaj tial ne povis esti la suno, la luno, la steloj aŭ aliaj formoj de lumo, ĉar la Biblio mencias tiujn aferojn kiel rezulton de la tria tago de la kreado. Ĝi devas tial esti esprimo de io tute alia ol tio, kion ni cetere kutimas kompreni sub ĉi tiu nocio. Kiam ĝi estis la unua, kiu estis kreita aŭ elvokita, ĝi sekve ekzistis antaŭ ĉio alia. Ĝi "brilis" jam en la tempo, kiam ne ekzistis astroj aŭ planedoj, nek homoj, bestoj aŭ plantoj. Ekzistanta antaŭ ĉio alia, ĝi povis esti nur tio, kio ĉiam ekzistas antaŭ la manifestado kaj spertado de la viva estulo, nome la inklino, la avido kaj la volo. Sen tiuj ĉi faktoroj ĉia formo de kreado estas ja laŭ kosma vidpunkto maleblaĵo.

## 2. "Envolviĝo" kaj "elvolviĝo"

Tiel la konscio de ĉiu viva estulo estas bazita sur avido kaj la volo elvokita surbaze de ĝi. Ke granda parto de la manifestaĵoj de la individuo okazas kiel aŭtomataj funkcioj, kiel ekzemple ĝia interna organfunkcio, tio ne ŝanĝas nek malverigas la principon. Laŭ Livets Bog (La Libro de la Vivo) aŭtomatfunkcioj povas estiĝi nur per tio, ke unue ekzistas maldorma tagokonscia avido (A-scio) kaj poste tra konscia volgvidado realiĝis praktika manifestado kaj agado (B-scio), finfine, post sufiĉe da ripetado estiĝas rutin- kaj kutimfunkcioj (C-scio), kio estas la samo kiel aŭtomatfunkcioj. Tiel tiu interna forto aŭ la avido kaj volo de la individuo estas tiu "lumo", kiun la Biblio lokas en la "unua tago" de la kreado. Sed kion oni do komprenu per la "unua tago" de la kreado? – Laŭ Livets Bog la vivo kaj sekve ankaŭ la kreado neniam ajn komenciĝis, same kiel tiu kreado ankaŭ neniam povos ĉesi. Sed tiu eterna estado okazas en du alternaj sekcioj, kiujn mi en la sama libro nomis "envolviĝo" kaj "elvolviĝo" aŭ "evoluo" kaj tiuj realaĵoj kune konstituas tiun parton de la vivspertado, kiun mi nomis "la spiralo". Envolviĝon oni ĉi tie komprenu kiel formon de spertado, kiu estas rekte kontraŭa al tiu, kiun ni nun spertas en formo de elvolviĝo aŭ evoluo. Tra ĉi tiu laste menciita formo la estulo pli kaj pli riĉiĝas je spertoj, per kiuj kreskas ĝiaj sento kaj inteligento, tiel ke la estulo fariĝas pli kaj pli intelektigita aŭ pli kaj pli spirita, dum tra la envolviĝo la estulo pli kaj pli ligiĝas al la materio, transformiĝas de spirita estulo al tiu materia fizika estulo, kiu estas komplete nescia pri sia origina spirita stato. Dum la kulmino de "evoluo" okazas en la plej alta spirita sfero, en "la dia mondo", la kulmino de "envolviĝo" okazas en la plej materia regno, "la bestoregno" aŭ la zono de la mortiga principo, kiu ĝuste kulminas en la sfero de la teraj homoj. Tiuj du sekcioj de la spiralo milde kaj tre malrapide transombras unu en la alian, tiel ke ne aperas akre koncentrita limlinio inter ili. Tial ni vidos, ke tra certa parto de la spiralo "evoluo" kaj "envolviĝo" okazas samtempe. Unu el la esprimoj de "envolviĝo" estas malfortiĝanta dikoncepto ĉe la tera homo aŭ ĝia kreskanta materiisma stato, kiu finfine kulminas en la kompleta aŭ centprocenta dineado kaj ĝia

responda centprocenta interesiĝo aŭ okupiteco pri la materio. En tiu stato estas maleble por la individuo kredi aŭ kompreni, ke povas ekzisti viva konscio, Dio aŭ Providenco malantaŭ ĉiuj funkcioj de la naturo. Ĝi kredas pri sia speco, ke ĝi estas la plej alta ekzistanta formo de manifestado de vivo, kiu entute povas ekzisti.

### 3. La instinkto estas restaĵoj de estinta "kosma konscio"

Se ni reiras en la evoluo, ni vidas, ke antaŭaj homoj laŭ materia mezuro estis pli primitivaj, sed en sia rilato al la naturo aŭ al Dio ili ankoraŭ grandskale reprezentis restaĵojn de estinta "kosma konscio". Tiaj estuloj absolute ne povas imagi, ke ne ekzistus viva Providenco, Dio aŭ dieculoj malantaŭ ĉiuj diversaj fenomenoj de la naturo. Sekve malantaŭ la bruego de la tondro, malantaŭ la grandioza potenco de la ŝtormo, malantaŭ la surfo de la maro kiel ankaŭ en vulkanoj, rokoj kaj montoj aŭ malantaŭ kometoj, suno kaj steloj ili vidas regantajn supernaturajn spiritojn. Por ili estas neimageble, ke la menciitaj realaĵoj estus hazardaj, senvivaj aŭ mortaj fenomenoj. Tiel ĉi tiuj estuloj vivas en pli granda kontakto kun la Providenco ol faras la materiisma kulturhomo, kiu nek kredas nek povas kompreni Providencon. Ke la naturhomo ne plu povas komprenigi al si tiun Providencon en realaj sciencaj aŭ inteligentecaj pensospecioj ja estas memkomprenebla afero. Tiu kapablo ja antaŭ longe estas malfunkciigita pro la okazanta "envolviĝo", al kiu la homo estas subigita. Ĝian percepton de la Providenco malantaŭ ĉiuj aferoj, ĝi povas percepti nur per ĝia instinkto. Ĝiaj religiaj perceptoj esprimiĝas nur en instinktaj sensetoj kaj fenomenoj. Kaj ĉi tie la pratempaj restaĵoj de "kosma konscio" aperas kiel identaj kun tio, kion en la ĉiutaga vivo ni nomas la instinkto.

Se ni iras pli malantaŭen en la evoluo kaj tie rigardas la estulojn, kiujn ni nomas bestoj, ni vidas, ke tiu ĉi instinkto estas eĉ pli domina aŭ gvida en la konscio de tiuj estuloj. Estas tiu instinkto aŭ tiu restaĵo de degeneranta "kosma konscio", kiu en multege da manieroj gvidas ĉi tiujn estulojn sur kampoj, kie en la fizika sfero ili ankoraŭ ne povis proprigi al si sciencan maldorman tagokonscian komprenon. Kion vi opinias pri la eta kokido, kiu komencas skrapserĉi grenojn aŭ grajnojn tuj post sia elveno el la ovo, aŭ pri la certa flugo de la migrobirdoj milojn da mejloj ĉirkaŭ la terglobo al la dezirataj celoj? – Ĉu homo kapablas tion fari? – Ĉu por ĝi ne necesas unue havigi al si tiun kapablon per peniga studado kaj poste apogi ĝin per kompaso aŭ aliaj instrumentoj, mezuroj kaj kalkuloj?

Se ni iras ankoraŭ pli malantaŭen en la evoluo kaj rigardas la vivoformojn, kiujn ni nomas "plantoj", ni vidas, ke ĉi tiuj estas komplete dominataj de la instinkto aŭ la restaĵoj de degeneranta "kosma konscio". Dum la aliaj menciitaj specioj, la teraj homoj kaj la bestoj, krom sia instinkto aŭ mortanta "kosma konscio" ankoraŭ havas komencan vekiĝantan tagokonscion, la fizika vivo de la plantestuloj kontraŭe estas bazita ekskluzive sur ilia instinkto. Ili ankoraŭ ne havas tagokonscion en la fizika sfero. Sed tra antaŭa minerala estado tiu estulo tamen atingis la fizikan sferon. Per interna avido ĝi iom post iom tiom envolviĝis en la fizikan materion, ke ĝi ricevis fizikan organismon, per kiu povas komenci estiĝi reagoj de influoj de la ekstera fizika naturo. Kaj ĝuste pro ĉi tiuj reagoj la estulo ricevas pli kaj pli grandan kapablon manifesti altiron kaj avidon al la fizika materio, en kiun ĝi do pli kaj pli "envolviĝas", fariĝas besto kaj poste tera homo, en kiu vivoformo la sama altiro atingas kulminon en la mortiganta kaj malamanta individuo.

### 4. La memorkapablo malantaŭ la kapablo de sensado kaj rekonado

Samtempe kun ĉi tiu "envolviĝo" en fizikajn materiojn, kiu faras la estulon peza kaj terligita, okazas la komenciĝo aŭ la unuaj stadioj de tiu procezo, kiun ni nomas "evoluo". Tra la menciitaj reagoj pro la kontakto de la individuo kun la ekstera fizika naturo estiĝas en ĝia konscio memoroj pri ĉi tiuj reagoj. Estas ĉi tiuj memoroj, kiujn ni nomas spertoj. Tiel iom post iom spertoj post spertoj ariĝas en la konscion de la individuo en organon taŭga por tio. Estas ĉi tiu organo, kiun en Livets Bog vi trovas sub la nomo "la memorkorpo". En kunligo kun la sumigita amaso da spertoj tiu ĉi korpo fariĝas kvazaŭ tuta kartoteko por la individuo. Sen tiu ĉi "kartoteko" sensado estus tute neebla por iu ajn estulo. Se en ĉi tiu momento vi perdus komplete vian memoron, do sensado estus same malebla. Estas ĝuste, ke vi tamen povus vidi, aŭdi, senti aŭ sensi la reagojn de la kontakto de via organismo kun la ekstera naturo, sed estus komplete maleble por vi identigi ĉi tiujn reagojn, ali-

vorte, estus tute maleble por vi scii, kion vi vidas, aŭdas, sentas aŭ sensas. En tia okazo vi ne povus scii, kie en ĉi tiu momento vi troviĝas. Ni supozu, ke vi aŭdus homon paroli. Sed tiam vi povus kompreni nenion ajn de la paralo. La bazo por via kapablo kompreni ion, estas ekskluzive la spertoj, kiujn vi eventuale jam antaŭe havas sur la koncernaj kampoj. Ju pli da spertoj vi havas pri la menciitaj kampoj, des pli grandan kapablon vi havas por kompreni ilin kaj finfine, kie via spertomaterialo estas sufiĉe ampleksa, vi  povas tute kontroli la kampojn aŭ la temojn. Rekte kontraŭe estas samgrade, kiel vi ne posedas la menciitajn spertojn. Sed kvankam vi ne komprenas la temojn, tio ja ne malebligas, ke vi bone povas aŭdi la parolon pri ili kaj ke via aŭdokapablo estas same bona kiel tiu de la estuloj, kiuj komprenas la parolon. Kiel vi vidas, la aŭdokapablo ne sufiĉas. La samo okazas koncerne ĉion, kion vi vidas. Se en via memoro vi ne havas spertojn parencajn al tio, kion vi vidas, vi povas neniel kompreni aŭ percepti, kio estas tio, kion vi vidas. Estas ja tiu afero, sur kiu ĉia superstiĉo estas bazita. Naturhomo de la plej malhela ĝangalo de la interno de Afriko, kiu vidas unu el la modernaj teknikaj mirindaĵoj de la kulturoj, kiel ekzemple aŭtomobilo, flugmaŝino aŭ alia formo de maŝino kaj perceptas tiajn aferojn kiel “sorĉon” aŭ kiel “supernaturajn”, faras tion ekskluzive pro tiu cirkonstanco, ke neniam ajn antaŭe ĝi spertis ion ajn similan kaj sekve ĝia spertaro aŭ memoro estas komplete malplena je tiaspecaj spertoj. Sekve en neniu alia maniero ĝi povas komprenigi al si, kiamaniere la maŝino povas funkcii, ol per la imago, ke ĝi estas animita de supernaturaj nevideblaj fortoj.

### 5. Por ke sensreago estiĝu travivaĵo aŭ rekono, ĝi devas per koncentrado esti kunligita kun spertoj de la individuo

Kvankam la fizika vidokapablo de la naturhomo estas same forta kaj klara kiel tiu de la kulturhomo, tio sole ne sufiĉas. La sensado bone povas okazi, sed la rekono de la detala vero aŭ realo de la sensobjekto estas komplete malebla en situacioj, kie oni ne posedas spertojn pri antaŭaj respondaj aŭ parencaj spertoj, kiuj povas efiki kiel pli aŭ malpli granda materialo de antaŭscioj, per kiu oni, laŭ responda pli aŭ malpli alta grado, povas rekoni aŭ identigi la novan sperton. En ĉiu sensimpreso sekve okazas renkontiĝo inter forto eliranta el la pli profundaj konscitavoloj de la individuo kaj forto eniranta de la ekstera influo al la sensoj de la individuo. La forto eliranta de la interno de la individuo en sia plej forta apero estas tiu afero, kiun vi konas sub la nomo “koncentrado”. Kiam vi koncentras viajn pensojn, tio okazas efektive nur por klarigi al vi problemon pri io mistika aŭ nekonata. Tiu koncentrado de pensoj estas la samo kiel mobilizo de ĉiuj spertoj, kiujn vi havas en via konscio, kaj kiuj similas aŭ proksimas al la problemo. Koncentriĝo sekve estas afero, per kiu vi klopodas klarigi la nekonatan pere de la jam konata. Ke ĝuste estas tiel, montriĝas fakto per tio, ke en okazoj, kie vi ne povas en viaj pensoj aŭ memoroj trovi parencajn spertojn pri nekonata problemo, tiu problemo restas same mistika kaj enigma kiel por la homo en la ĝangalo estas radiofonio aŭ aliaj el la plej modernaj mirindaĵoj de la tekniko kaj scienco. Ĉia sensado sekve estas la samo kiel la reagoj de renkontiĝo inter konataj kaj nekonataj aferoj kaj niaj memoroj, kio signifas ilian renkontiĝon kun la reagoj de niaj antaŭaj spertoj. Ĉio, kio efikas al niaj sensoj, senkonsidere ĉu temas pri vido, aŭdo, flaro, gusto aŭ sento, estas por ni tute nekonata ĝis tiu momento, kiam la reagoj de la sensoj kunligiĝas kun niaj antaŭaj spertoj. Nia kapablo de sensado kaj per tio ankaŭ nia kapablo kompreni, sekve dependas de tio, kiom granda estas la spertomaterialo en nia memoraro. Ju pli da spertoj ni posedas sur iu aŭ alia speciala kampo, des pli facile, profunde kaj rapide ni sensas novajn spertojn sur tiu kampo, dum la malo okazas sur ĉiu kampo, kie troviĝas tre malfortaj aŭ komplete mankas antaŭaj spertoj.

### 6. La kaŭzo de “ĉies milito kontraŭ ĉiuj” estas afero de spertoj kaj sensado

Laŭ tio montriĝas memkomprenebla afero, ke ne ĉiuj el ni sensas la samajn aferojn, problemojn aŭ objektojn kun sama facileco aŭ same rapida kompreno. Iujn problemojn aŭ objektojn ni povas tre facile kompreni aŭ percepti, dum koncerne aliajn problemojn ni bezonas jarojn da studado, antaŭ ol ni mense kapablos plene regi ilin. Samtempe troviĝas estuloj, kiuj tute ne povas kompreni problemojn, kiuj por ni estas tre facile kompreneblaj, dum aliflanke tiuj estuloj povas havi grandan kapablon kompreni aŭ percepti problemojn, pri kiuj ĝuste ni malfacile povas akiri komprenon. Kiel

ni vidas, ne sufiĉas, ke la eksteraj fizikaj sensoj estas centprocente sanaj, klaraj kaj puraj. La kvalito de la sensado same altgrade dependas de tio, kia anticipe estas nia spertomaterialo. Kaj ĉar antaŭe ni ĉiuj ja ne havis precize la saman sorton aŭ alimaniere spertis la samajn spertojn, ja ne estas strange, ke ni aperas tiel tre malsimilaj, kiel ni fakte faras, kaj en sia plej ekstrema formo tiu ĉi malsameco povas fari la individuojn tute kontraŭaj, povas fari ilin kontraŭuloj unu de aliaj, tiel ke laŭ sia naturo ili estas provizore destinitaj miskompreni unu la alian sur multaj kampoj. Kaj estas tiu ĉi antaŭdestino, kiu estas la plej profunda radiko de tiu florado de la malo de la paco, kiu kulminas en tio, kion ni nomas "ĉies milito kontraŭ ĉiuj".

Ĉi tie ni atingis la radikon de tio, kio hodiaŭ turmentas kaj suferigas la homaron. Kiam ie okazas milito, ĉu inter individuoj aŭ inter ŝtatoj ne eblas ŝarĝi la absolutan kulpon sur iu el la partoj de la konflikto, ĉar el kosma vidpunkto la afero estas nur demando pri sensado. Neniu ajn formo de konflikto povas estiĝi sur alia bazo ol la reciproka erara sensado de la kontraŭuloj unu pri la alia. Se, laŭ kosma rigardo nur unu el la partoprenantoj sensus aŭ vidus ĝuste, do tiu partoprenanto plene komprenus, ke en la koncerna momento la alia partoprenanto neniel povas esti alia, ol ĝi ĝuste estas. La tuta konduto de ĉi tiu partoprenanto estas ja rezulto de la tuta konflikto de tiuj memoroj aŭ spertomaterialo, kiujn ĝi posedas. Ke tiu spertomaterialo ne estas tiel ampleksa, ke laŭ kosma vidpunkto la estulo povas percepti la situacion ĝuste, pri tio ĝi neniel mem kulpas, same kiel ĝi ne mem kulpas pri la alteco de sia fizika organismo, aŭ ĉu ĝi havas brunajn aŭ bluajn okulojn. Sed ĉar spertomaterialo tiel mankas al tiu ĉi menciita partoprenanto de la batalo, ĝia konscio kaj sekve ankaŭ ĝia kompreno kaj la sur ĝi bazita agmaniero ja necese devas elmontri tiun mankon aŭ esti stampita de ĝi. Ĉar tiu manko dependas de mankanta spertomaterialo, mankantaj spertoj, ĝi ja identas kun nepreta mensa kresko. Laŭ mensa vidpunkto la estulo ankoraŭ ne estas plenkreska. Ĝi estas ankoraŭ "malpliaĝa" estulo kaj sekve de tio povas manifesti nur agojn aŭ konduton de "malpliaĝaj" estuloj. Se la alia partoprenanto de la batalo estus kosme konscia estulo, la menso de tiu estus tiel abunde provizite de spertomaterialo, ke ĝi facile konstatus la mensan malpliaĝecon de sia kontraŭulo, kaj neniu batalo povus estiĝi. Normala homo ne komencas bati alian homon, ĉar la alteco de ĝia korpo ne estas tiom aŭ tiom da centimetroj alta, aŭ alimaniere montriĝas, ke ĝi ankoraŭ apartenas al la malpliaĝaj. Ĝi neniam atendas de iu alia estulo ion alian ol ĝuste tion, kion ĝi precize faras aŭ manifestas. Ke tiu manifestado eventuale estas neperfekta, neniam povas instigi ĝin al iu ajn brutala ago kontraŭ la neperfekta estulo. Ĝi scias, ke la perfektado de la estulo en neniu ajn maniero estas "temo de venĝo", sed kontraŭe centprocente estas "temo de kreskado". Ĉi tie ni pli bone komprenas la sintenon de la mondliberiganto al liaj ekzekutistoj, kiam li diras: "Patro, pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras".

## 7. Ĉia formo de malpaco radikas el mensa malpliaĝeco aŭ intelekta nekapableco

Sed, se la ĵus menciita estulo ne havus "kosman konscion", ĝi same kiel la alia kontraŭulo en la batalo estus pli aŭ malpli nepreta, estus mense pli aŭ malpli "malpliaĝa". Tiu "malpliaĝeco" plue sin montrus en mankanta kompreno pri la alia partoprenanto de la batalo kaj sekve donus bazon de reciproka malpaco aŭ milito kaj nepaciĝemo inter la partoprenantoj, kaj ĉi tie ni havas tiun staton, kiu fakte estas ordinara inter la teraj homoj. Iu ajn malpaco inter ili povas ekzisti nur kun la ĉi tie priskribita rilato kiel ĉefa kaŭzo. Ĉiu malpaco sekve radikas ekskluzive el mensa "malpliaĝeco" aŭ nekapableco pri altintelekteco. Ĉiu persekutado de homo fare de alia homo, ĉu en formo de kalumnio, malica kritiko, brutaleco, perforto, korpodifektado aŭ eĉ mortigo, neniam en iu ajn situacio povas esti esprimo de altintelekteco aŭ de sensa finevoluo. Tiuj simptomoj neniam povas esti io alia ol esprimo de mankanta spertomaterialo, mankanta homa matureco. Por la sufiĉe evoluinta esploranto ili montras kiel neskueblan fakton kaj sekve ankaŭ sciencon, ke laŭ kosma vidpunkto tiaj estuloj en la realo tute ne "scias, kion ili faras". Ilia kompreno de la situacio estas tute iluzia. Ili kredas, ke la kontraŭa partoprenanto povas esti alia, ol ĝi ĝuste estas, ĝuste tiu iluzio ja ĉiam estas la kaŭzo de la batalo.

Kiamaniere, laŭ fizika rigardo, iu estulo povu havi alian altecon ol tiun, kiun ĝi ĝuste havas en la koncerna momento? – Kiel ĝi havu alian mensan altecon, alian karakteron, alian pensosintenon aŭ koncepton pri aktuala situacio ol ĝuste tiun, kiun en la koncerna momento ĝi havas? – Iom post

iom ĝi povas ĝis certa grado ŝanĝi sian vivon, siajn pensosintenon kaj koncepton pri la ĉirkaŭaĵoj aŭ sia proksimulo, sed ĝia agado aŭ naturo en la koncerna nuno aŭ momento neniel povas esti alia, ĉar en tia okazo la estulo devus esti havinta alian estintecon kun tute alia sorto, tute aliajn gepatrojn, devus esti el tute alia gento, deveninta de tute alia socinivelo, aliaj sociaj cirkonstancoj aŭ multaj aliaj similaj kondiĉoj. Fariĝi indigna, brutala aŭ venĝema rilate al alia estulo sekve estas la samo kiel persekuti kaj turmenti la estulon, ĉar ĝi ne havis tiun necesan estintecon kun la ĉi tie priskribitaj necesaj antaŭaj kondiĉoj. Ke ĝis abundeco oni mem povas plenumi tiujn kondiĉojn, kiujn oni tiel intense postulas aŭ atendas de aliaj, tio ja nur montras, ke oni mem havis la necesajn antaŭajn kondiĉojn, el kiuj tiu onia plenumo aŭ imagita ideala konduto neeviteble devis rezulti. Sed kiel malsaĝe estas postuli la saman konduton tie, kie komplete mankas la antaŭaj kondiĉoj? – Vere ne estis senkaŭze, ke necesis mondliberigado. Ne estis senkaŭze, ke devis naskiĝi estulo, kiu per altintelekta kompreno povis fari sian vivon unu sola granda praktikado de tio “alturnu la dekstran vangon post frapo sur la maldekstra”, estulo, kiu en brila mildeco povis pardoni ĉiujn siajn ekzekutistojn. Ne estis senkaŭze, ke necesis anonci “parakleton, la sanktan spiriton”, kio signifas revelacion de konscio, pere de kiu la konduto de tiu altigita estulo povu iĝi pravigita – ne kiel naiva apero de frenezulo – sed kiel science fundamentita prezentado de la plej alta kontakto de konduto kun la leĝoj de la universo aŭ kiel dia migrado en la spuroj de Dio mem, alivorte brila informo pri tio, kiel la kristnaska mesaĝo de la anĝeloj al la paŝtistoj sur la kampo: “Paco sur la tero” estus realigebla kaj per tio fariĝus je gloro al “Dio en la supera alto” – kaj “inter homoj difavoro”.

### 8. Nur tiuj estuloj, kiuj amas ĉion kaj ĉiujn, havas la veran pacon en sia interno

Kiel vi vidas, la kristnaska mesaĝo aŭ la kristnaska evangelio estas pli granda kaj pli proksima realo, ol vi eble antaŭe imagis. Ĝia aktualeco ne povas ne koncerni ĉiujn, kiuj troviĝas en malpaco, kio signifas en batalo, sufero, malĝojo kaj ĉagreno. Kaj kiuj aŭ kiom da teraj homoj estas liberaj de la sfero, en kiu tiuj kvar menciitaj aferoj estas elstaraj faktoroj? – La respondo nerefuteble estas jena: “Nur tiuj estuloj, kiuj amas sian proksimulon kiel sin mem, kio signifas: amas ĉion kaj ĉiujn, havas en sia interno neskueblan pacon, paco pere de kiu la neelĉerpebla fonto de klerigado, “la sankta spirito” aŭ “la kosma konscio” senbare malkaŝiĝos kaj fundamentos la menciitan ĉioamon per la scio de Dio mem kaj per tio ebligas al la estulo pensi la eternajn pensojn de la Ĉiopotenculo kaj iniciĝi en kompletan komprenon pri tiu objekto, kiun en formo de ĉio kaj ĉiuj ĝi antaŭ longe ĉirkaŭbrakis kaj enigis en sian amon. Nur en tiu estulo, en kies brusto la amo stimulas la pulson de la koro avantaĝe al la tuta mondo aŭ je ĝojo por ĉiuj aliaj vivaj estuloj, povas brili tiu klara lumo de la intelekteco aŭ kompreno, kiu forigas ĉian mallumon”.

### 9. La ĝusta kompreno pri la vivo kaj la el tio sekvanta humana sinteno al ĉio kaj ĉiuj ne estas donebla al iu estulo pere de potenco, torturo aŭ puno

Por atingi antaŭen al vera paco do necesas iri en la spuroj de la mondliberiganto. Estas necese klopodi agordi sin al tio, ke neniu estulo povas en la nuno aŭ en la nuna momento esti alia aŭ agi alimaniere, ol ĝi ĝuste faras, senkonsidere kiel grandan damaĝon aŭ utilon, senkonsidere kiel grandan suferon kaj doloron aŭ ĝojon kaj bonfarton tiu agmaniero kaŭzus al ĝi. Lerni kompreni tion estas lerni ne fari juĝon super suno kaj luno, ne fari juĝon super Dio. Sed tiu kompreno kaj la el ĝi sekvanta humana sinteno al ĉio kaj ĉiuj ne estas donebla al vi per iu ajn formo de potenco, torturo aŭ puno, same kiel ĝi ne estas donebla al vi per ia ajn formo de miraklo. Preskriboj aŭ instrukcioj pri proprigo de la menciita konduto povas esti utilaj, sed nur tiam, kiam la Providenco aŭ la naturo alimaniere donis al vi tiel elstaran maturecon, ke kun fido kaj kredo vi povas akcepti la preskribojn kiel aspirindajn idealojn kaj per tio povas fari ilin gvidilo por via ĉiutaga vivo. Sed por ke vi tiel povu akcepti idealojn la vivo mem, la naturo aŭ la Providenco devas krei en via konscio iun por tiuj idealoj konforman antaŭan maturecon, kio alivorte signifas malsaton, soifon aŭ avidon pri ĝuste tiuj idealoj. Tiun maturecon, tiun avidon pri idealoj, tiun malsaton pri pli perfekta estadoformo la Providenco aŭ la naturo kreas ekskluzive tra via ĉiutaga sorto. Tra viaj ĉiutagaj spertoj kaj precipe per la amaraj, suferoplenaj kaj dolorigaj spertoj via menso ricevas tiun maturecon, kiu kondiĉas, ke

en via interno komenca kreado de paco povas komenciĝi. Tiel ni restos ĉe la vido de tio, kiel la naturo agos por konduki vin antaŭen al tiu matureco.

## 10. La vivkompreno de la estulo estas ĝia sortokompaso

Kiel vi jam eksciis, nia tuta spertado de la vivo okazas pere de niaj sensoj. Kiel mi menciis ankaŭ antaŭe, tiu spertado estas reago inter la forto eliranta el nia interno kaj la forto eniranta de ekstere. La unua forto estas la samo kiel nia volo, la aktiviĝo de niaj avidoj, deziroj aŭ intencoj. La alia forto estas ĉiuj influoj direktitaj al nia memo, al nia organismo, flanke de la naturo, de niaj ĉirkaŭaĵoj, de niaj kunestuloj. Tiuj du formoj de fortoj sekve renkontiĝas en nia konscio. Ĉe ilia renkontiĝo estiĝas la reago, kiu igas niajn pensojn cikli kaj niajn sensojn vibri kaj niajn nervojn registri doloron aŭ bonfarton. Kaj la tuta procezo do konstituas nian spertadon de la vivo aŭ tion, kion ni nomas nia sorto. Tiun tutan cirkuladon de energio en la estulo ĝi povas percepti nur kiel aŭ ”doloron” aŭ ”bonfarton”.

Senkonsidere kiujn spertojn, kiujn pensojn aŭ kiujn sentojn la individuo spertas, ili povas neniel ekzisti sen tio, ke laŭ pli aŭ malpli alta grado ili reprezentas unu aŭ la alian el la menciitaj du kontrastoj. Ĉia manifestaĵo, ago aŭ sperto, kiun registras la sensoj de la individuo, sekve apartenas nepre al unu aŭ alia ŝtupo de la skalo inter doloro kaj bonfarto. La spertado povas reprezenti ŝtupon, kiu tiel altgrade troviĝas sur la flanko de la bonfarta kontrasto, ke la individuo sentas sin ĝoja. Ĝia sorto esprimiĝas kiel feliĉa. Sed la sperto povas ankaŭ altgrade esti sur la flanko de la dolora kontrasto, kaj tiam la estulo sentas malĝojon kaj apation kaj perceptas sian sorton kiel malfeliĉan. Inter la ekstremoj de tiuj du kontrastoj: doloro kaj bonfarto, la individuo balancadas kun sia sorto aŭ spertado de la vivo. Ĝi sin direktas aŭ al la kontrasto de doloro aŭ al la kontrasto de bonfarto. La direktilo de la kurso estas ĝia volo, dum ĝia kompreno pri la vivo estas la kompaso. Pro tio ke la atingo de la bonfarta kontrasto, kio signifas atingon de la normala korpa kaj anima bonfarto, estas bazita ekskluzive sur tiu “kompaso” aŭ la kompreno de la estulo pri la vivo, ĝia tuta sortokonstruado direkte al bonfarto dependas plene de tiu ĝia kompreno. Se ĝi havas ĝustan aŭ absolute veran komprenon pri la vivo kaj la estado ĉirkaŭ si, pri la kunestuloj, pri bestoj kaj homoj kaj cetere pri ĉio, kio apartenas al la nocio “la naturo”, ĝi en ĉiu situacio vidas la ĝustan kunligitecon inter si mem kaj la kaŭzoj de la situacio. Ĉi tie ĝia “kompaso” sekve efikas absolute ĝuste. Sed se ĝi ne havas tiun absolute veran komprenon pri la vivo aŭ la estado, ĝi ne kapablas havi klaran vidon en la koncernaj situacioj. Esceptoj de ĉi tio tamen certagrade estas plantoj kaj bestoj kun ilia ankoraŭ perfekta instinkto. Sed en la menciitaj situacioj la tera homo estas devigita agi blinde. Tiel ĝi agas laŭ scio, kiun ĝi ne posedas. Ĉi tie ĝia “kompaso” montras erare, kaj laŭ responda grado la estulo devias de la kurso, kiu kondukas al la vera bonfarto: feliĉa sorto aŭ estado, kiu kulminas en la perfekta spertado de la vivo, kiu estas esprimita kiel “la ĉiela regno”. Ĝia kurso nun kondukas kontraŭ danĝeraj mensaj kaj fizikaj rokoj kaj ŝeroj. En la surfo de la malvirtoj, ekscesoj, malamo kaj kolero, de tempo al tempo, rompiĝos aŭ ruiniĝos pluraj surteraj vivoj. Estas la invalideco de tio, kion ni esprimas kiel malfeliĉan sorton aŭ kiel la solan, kio povas ekzisti kiel tiu malo de “la ĉiela regno”, kaj kiun ni nomas “infero”.

## 11. La perfekta feliĉa sorto ne estas atingebla per kredo je la potenco de la glavo

Grandskale la direkto de la menciita “kompaso” aŭ la koncepto de la estuloj pri la vivo mem kaj la estado ne estas tute ĝusta, kio klare vidiĝas en la atmosfero, kiu vaste dominas la teran zonon. Homoj malsatas kaj frostas, kvankam la terglobo estas abunde ekipita per nutraĵoj kaj varmofontoj. La teraj homoj murdas kaj mortigas unu la alian por akiri lokon en la sunlumo, kvankam ĉiuj kontinentoj kaj maroj de la terglobo banas en la ĉiela lumo de tiu brila stelo. Tiuj samaj estuloj trompas kaj prirabas unu la alian je valoroj kaj trezoroj, per kiuj la terglobo estas tiel abunde kaj amplekse ekipita, ke kompare kun tio ĝia nombro de homoj estas tiel malgranda aŭ eta, ke tiurilate ĝi estas konsiderebla preskaŭ kiel ankoraŭ neloĝata mondo. Posedante riĉajn provizorojn aŭ fontojn de nutraĵoj el tiel grandiozaj dimensioj, ke ili sufiĉas por miriadoj da ankoraŭ nenaskitaj animoj de miloj kaj miloj da venontaj generacioj, la membroj de la unuopaj nuntempe vivantaj generacioj realigas tian procezon de korpodifektado aŭ mortigado unu al la aliaj, ke ilia sango koloriĝas eĉ la

akvojn de la riveroj. Ilia mortstertoro sonas tra tropikaj arbaroj kiel ankaŭ trans la senfinaj dezertoj de la blankaj neĝokampoj, dum la postvivantoj post forlaso de hospitaloj kaj resaniĝejoj lamiras sur artefaritaj gamboj, laboras per artefaritaj membroj kun manoj anstataŭigitaj per feraj hokoj kaj kun la okulaj kavoj plenigitaj per pentritaj vitraj globoj, blinde palpantaj aŭ gvidataj en ŝnuro de – dresitaj hundoj. Vere, la tiel alte admirata "mastro de la kreaĵoj" ĉi tie ŝanĝis rolon kun la "senprudentaj" bestoj.

Sed ĉi tie oni komprenu, ke la mencio de tiuj aferoj ne okazas por subtaksi la artefaritajn membrojn kaj la ceteran grandan helpon, kiu en tiel benoriĉa maniero estas donebla al la korpodifektitaj kompatinduloj, tute kontraŭe, ankaŭ en tio ni devas vidi la dian helpan manon etenditan al la malfeliĉulo. Ni menciis la aferojn ĉi tie nur por montri la rezulton de erara anima direkto. Certe neniu militisto atendas, ke la rezulto de lia okupo reprezentas tiel eraran aŭ falsan kurson direkte al la bonfarta kontrasto, ke ĝi povas konduki lin en tiom tristan situacion: daŭre necese esti kondukata per ŝnuro de senprudenta besto. Ĉu li ne kredis atingi la feliĉon kaj la bonfarton per sia batalo? – Ĉu li ne kredis, ke en la realo la feliĉo apartenas al li, se li sukcesus ligi aŭ ekstermi la proksimulon, la kontraŭulon? – Ĉu li ne kredis je la potenco de la glavo? – Ĉu li ne kredis, ke potenco estas la vojo al ĉio? – Ĉu ne tiu lia tuta kredo aŭ kompreno pri la vivo kaj la estado estis precize la kontraŭo de tio, kio estas absolute reala, kio estas absolute vera?

Sed kiel oni povus atingi la feliĉon kaj la bonfarton semante malfeliĉon kaj suferon por aliaj? – Ĉu oni ne atendu, ke ankaŭ tiuj aliaj deziras sin defendi? Sed per tio oni ja kreas por si mem la riskon fariĝi aŭ korpodifektita, ruiniĝi, el kio sekvas iom mizera "bonfarto", aŭ aliflanke fariĝi venkanto, kiam necesas konservi tiun pozicion per malliberigo kaj subpremo al la aliaj, esti devigita semi korpodifektadon kaj suferon? Sed kiu povas vivi en bonfarto, kiu senĉese konserviĝas surbaze de korpodifektado kaj malfeliĉo de aliaj, senĉese estas rabo de vivo kaj moveblecco de aliaj estuloj? – Ĉu ne ĉi tie la respondo estas, ke se ĝi ne estas nenormala estulo kun sadismaj inklinoj, tion povas fari nur homo nesentema, homo al kiu mankas kapablo de kompato, estulo, kiu mense troviĝas tre proksime al la primitivaj stadioj de la besto? – Sed en bonfarto, kiu konserviĝas ekskluzive surbaze de batalo, neeviteble ĉiam estas enmiksita timo pri pli aŭ malpli posta malĝojiga rezulto de la batalo. Kaj bonfarto miksita kun timo ne estas perfekta bonfarto, ne estas perfekta feliĉo.

La absoluta ekzakteco de "la sortokompaso", kio alivorte signifas la absolutan identecon de nia vivkompreno kun la vero aŭ la realo sekve estas la absolute sola kondiĉo, laŭ kiu ni povas konstrui perfekte feliĉan sorton kaj per tio veni en centprocentan kontakton kun la tute cetera ĉirkaŭ ni troviĝanta plenumo de la dia mondplano kaj same kiel la mondliberiganto fariĝi "unu kun la Patro". Nur fariĝante "unu kun la Patro" ni spertos la realiĝon de la kristnaska mesaĝo: "Paco sur la tero", paco en nia menso kaj paco inter ni kaj niaj kunestuloj, homoj, bestoj kaj plantoj.

## 12. Tie, kie troviĝas la kosma malpliaĝeco de la estulo, ĝi ne povas vidi la perfektecon aŭ la ĉioamon en la naturo aŭ la universo

Kiel antaŭe menciite ni povas en la sortoj de la teraj homoj vidi, ke eĉ en tre granda skalo tiuj estuloj ankoraŭ troviĝas sur erara kurso. Malgraŭ la saĝo- kaj idealpreskriboj kaj ordonoj de la religioj centmiloj da estuloj direktas sian sorton rekte al la mallumo, al la suferoj, al "la infero". Kaj la eklezia kristanismo antaŭdiras por tiuj estuloj "eternan perdiĝon". Sed tiel ne okazas. Estas ĝuste tra la suferoj, jes eĉ en "la fajro de la infero" mem, ke ni povas vidi la potencan gvidantan manon de la Ĉiopotenco, lian eternan logikon kaj amplenan planon por la vivaj estuloj. Neniam iu estulo venis en la mondon kaj renkontis la klaran lumon de la suno por fini en "eterna infero", kaj same kiel neniu estulo iam ajn komencis sin vivteni enspirante la kristale klaran aeron aŭ atmosferon de la terglobo por fini en eterna venĝo, torturo aŭ korpodifektiĝo, kiujn elpensis Providenco kiel "punon por pekoj". Ne, tra "la kompleta mallumo de infero", kie la mizero estas plej granda, ĉiu estulo neeviteble sentos, ke Dio estas plej proksime, devas aŭdi lian voĉon, senti lian savan kaj ŝirman malfermitan brakumon kaj sperti, ke neniam en iu momento liaj karesoj povas forlasi la estulon, sed estos eterne ĉeestantaj tra tempo kaj spaco, tra lumo kaj mallumo. Sed tion la tera homo ankoraŭ ne sentas. Ĝi ankoraŭ ne havas tian evoluintan sentokapablon aŭ tiel evoluintajn sensojn, ke ĝi povas vidi lumon en la mallumo, vidi amon malkaŝiĝi en la suferoj aŭ vidi dian perfektiĝon pere de la

malfeliĉaj sortoj. Kontraŭe, ĝi vidas aŭ sentas ĉefe nur mallumon en la mallumo. Eventualan persekuton, kalumnion aŭ antipation fare de sia proksimulo ĝi sentas kiel "malicon". En sia eventuale malfeliĉa sorto ĝi vidas sin mem kiel viktimon de ludo de hazardaj superaj senvivaj kaj blindaj fortoj aŭ malfavoron, persekuton kaj "punon pro pekoj" fare de kolera Dio. Estas memkomprenebla afero, ke en tia situacio ĝi ne povas percepti la plej grandan rezulton de la vivo: "Ĉio estas tre bona". Tiu homo sentas aŭ opinias, ke tia rezulto estas absurda. Ĝi ne povas kredi aŭ kompreni, ke la suferoj aŭ ĝia malfeliĉa sorto povas esti bono. Ĝi sentas sin mem kiel martiron aŭ objekton de granda maljusto. Kaj estas ĝuste en tio, ĝia kosma "malpliaĝeco" aperas. Ĉar neniu povas, laŭ kosma vidpunkto, fari maljuston aŭ suferi maljuston. Ĉio en la dia mondplano estas centprocente utila, kio alivorte estas la samo kiel centprocente amplena. Tiel la mondplano do estas kulmino de amo.

Sed kiam ĝi estas kulmino de amo, ĝi ja neniel povas esti pli bona. Kompreni tion kaj agi laŭ tio sekve estas la samo kiel esti "unu kun la Patro", kio denove estas la samo kiel la absoluta kondiĉo por atingi en sia menso la veran pacon kaj per tio sperti tiun "agrablon", kiun promesis la kristnaska mesaĝo de la anĝeloj.

## 13. La teraj homoj estas ankoraŭ nepretaj estuloj koncerne la manifestadon de la dia mondplano

Estas do la kompreno de la estuloj pri la vivo, ilia mensa kompaso, ĉe kiu io eraras. Ĉie, kie oni opinias sin persekutata, sentas sin objekto de "puno" fare de la Providenco, tie montriĝas, ke senkonsidere ĉu la situacio aperas kiel rekta persekuto fare de la proksimulo, ĉu ĝi aperas kiel malsano, malĝojo kaj mizero, senkonsidere el kiu speco estas la sufero, ĝi estas laŭ kosma rigardo tute natura realiĝo de kaŭzo kaj efiko, kiu estas kunefika ero en la perfektigo de la granda kreoprocezo, en kiu la tero transformiĝis el sia fajrostato al sia nuntempa grado de loĝebleco por animala vivo, kaj tra kiu ĝi estos kondukata antaŭen al tia preta stadio, kie la nun ordinaraj suferoj fariĝos fabela memoro. Kiam la estuloj ne havas la ĝustan sintenon al kaj komprenon pri la vivo, en kiu ili mem konstituas parton, ili ankaŭ ne povas gvidi sian sortodirektilon, sian volon, ĝuste. Tial ilia agmaniero fariĝas erara. Per tio ili aktivigas kaŭzojn, kiuj kreas tute aliajn efikojn ol tiujn, kiujn ili antaŭe intencis. Ĉar tiuj eraraj efikoj malkaŝas sian erarecon kiel malharmonion, kiel suferon kaj doloron, kiel malĝojon kaj malfeliĉon, do ĉio apartena al malharmonio aŭ sufero sekve estas ekskluzive efikoj de erara agado. Sed, ĉar erara ago siaflanke povas ekzisti ekskluzive kiel realigo de erara volo kaj tiu povas esti identa nur kun erara kompreno pri la vivo kaj la estado mem, ĉu pri la proksimulo, ĉu pri la naturo, la malfeliĉa sorto, tiam la suferoj kaj la doloroj sekve povas esti nur esprimo de io nepreta en la granda kreoprocezo. Tio plue montriĝas en tio, ke en ĉiuj situacioj, kie la volo kaj sekve ankaŭ la agado realiĝis ĝuste, kio signifas avantaĝe al natura bonfarto por la ĉirkaŭaĵoj de la origino, tie la harmonio kaj sekve la paco finfine fariĝis la natura kaj neevitebla efiko. Ĉi tie estiĝas kvazaŭ ekvilibro inter la energioj, la pensospecoj de la estuloj, iliaj mensa konduto kaj sinteno, ĉi tie la malfeliĉaj sortoj malaperas kiel roso en la sunlumo, kaj la absoluta bonfarto komencas aperi en la sortoj, kion jam anticipe oni povis vidi kiel estante la intenco de la mondplano. En mala okazo la tero ne estus tiel abunde ekipita per kondiĉoj kaj eblecoj por kreado de tia harmonio aŭ feliĉostato kiel tiu, kiun ĝi montriĝas kapabla plenumi pere de la multeco de ĝiaj vivproduktoj rilate al la nombro de estuloj en ĝia regiono. Abundo da eblecoj kaj kondiĉoj por kreo de bonfarto sekve ne mankas sur la tero. La homoj bezonas nur preni kaj utiligi ilin. Sed montriĝas, ke ĝuste tion ili ne kapablas. Ili mortas pro malsato kaj malvarmo meze en paradiza ĝardeno plena de nutraĵo, sunbrilo kaj varmo. Ili murdas, mortigas kaj korpodifektas unu la alian, ĉar reciproke ili kredas, ke la proksimulo estas la "malica" kreanto de ilia sorto. Kaj nenio povas esti pli erara. La proksimulon oni ne korpodifektu, ekstermu aŭ neniigu, sed oni devas utiligi la provizaĵojn de la terglobo, prilabori kaj administri ilin. Sen tiu kompreno pri la vivo oni neniel povas esti en kontakto kun tiu intenco, kiu ekzistas malantaŭ la transformiĝo de la terglobo de eksplodantaj, fandiĝantaj kaj bolantaj fajraj materialoj al mondo kun tiel abundaj viveblecoj por spertado kaj bonfarto tra karno kaj sango kiel tiu, kiun reprezentas la tero. Por kio alie ĉiuj tiuj abundaj vivkondiĉoj, provizoj kaj eblecoj? – Ĉu ne ĉi tie estas montrita al ni la vojo aŭ la direkto por nia spirita aŭ kosma kurso? –

Ĉu ne ĉi tie estas klare videble, ke tiu, kiu malamas kaj persekutas sian proksimulon aŭ alimaniere detruas ties eblecojn de vivofeliĉo, agas rekte kontraŭ tiu kreoplano, laŭ kiu okazas la transformiĝo de la tero. La tero transformiĝas de eksplodanta fajramaso al planedo kun tiom superaj kondiĉoj por bonfarto por la nuntempe vivanta nombro de individuoj, ke eĉ estas eblecoj de bonfarto por miriadoj da ankoraŭ nenaskitaj estontaj generacioj. Ĉu oni kredas, ke tiu abundeco de viveblecoj estas kreita, por ke iuj individuoj pereu pro malsano, kripliĝo kaj morto, ĉar ili ne havas aliron al tiuj viveblecoj aŭ provizaĵoj, kaj ke aliaj ruiniĝu en ekscesa manĝado, malŝparego kaj vivapatio pro tro facila aliro al la samaj vivovaloroj? – Ĉu ne ĉi tie estas facile vidi, ke tiuj malagrablegaĵoj ne devenas de eraro en la mondplano. Tiu plano kreis sufiĉe da bonaj materialaj provizoj. La malagrablegaĵoj ŝuldiĝas ekskluzive al la homoj mem. Ili estas produkto de iliaj propraj kompreno, volo kaj agado. Kiam tiuj aliaj kompreno, volo kaj agmaniero rezultigas tiajn konsekvencojn, do montriĝas, ke la mensostato de tiuj estuloj tute ne estas preta. La tero estas tiom progresinta en sia plano de kreiĝo aŭ estiĝo, ke ĝi estas preta por povi doni al la homoj agrablan kaj bonegan restadolokon kun cirkonstancoj por brila bonfarto, totala paco aŭ centprocenta feliĉo. Sed la mensostato de ĝiaj loĝantoj do ankoraŭ ne estas sur la sama alta nivelo kiel tiu stadio de la terglobo en la procezo de kreiĝo aŭ transformiĝo. Ke la mensostato de la estuloj estu progresata por akordiĝi al la menciita perfekta tergloba stadio iĝas fakto pere de tiu kreskado, al kiu la menciita menso montriĝas subigita.

## 14. Tio kio transformas la estulojn al humanistoj kaj kreas "kosman konscion"

La historio de la homaro, kiu iumaniere estas la plej juna aŭ lasta en la menciita granda kreoprocezo, ja montras, ke ĝi havas sian komenciĝon tute malsupre en barbaraj aŭ bestaj vivoformoj kaj daŭrigis tra la primitiva besta naturstato al la nuntempa kultura stato. Estas ĝuste, ke tiu kulturstato prezentas la mortigan principon en epoko, kiu multe superas ĉion, kion oni pli frue kapablis manifesti de la sama principo. Sed estas ankaŭ fakto, ke flanke de tiu praktikado de la menciita principo en formo de militado, mortigoj kaj korpodifektado kreske aperis en la menso de la homoj pligrandiĝanta intereso aŭ kompreno pri tio, ke sen humanismo, kulturo kaj sekve terhoma paco kaj feliĉo neniel povas ekzisti. Ni tial vidas, ke barbaraj leĝoj, kiuj regis antaŭe, iom post iom estas forigitaj. Ne plu estas permesate malkaŝe aĉeti aŭ vendi homojn. Kaj same kiel oni batalis kontraŭ sklaveco, tiel oni nuntempe klopodas pere de polico kaj justico forigi agojn de ŝtelo, mortigado kaj perforto, kaj estas eĉ tiel, ke la kulmino de la plej granda malbono de la homaro, la milito, povas nuntempe ekzisti nur en la nomo de humaneco. Ĉiuj batalas por venki la supozatan malhumanecon de la kontraŭulo. Ĉu ne ĉiuj batalas por krei "juston" kaj pacon? Kiu kuraĝas konfesi, ke ili militas por la kontraŭa celo? – Kaj la rezulto de ĉiu tiu tuta batalado, de tiu realigado de suferoj, ne forestas. Tiu rezulto vere estas la krisolo de fandujo de la homaro. El la procezo povas aperi absolute nur tiu sola preta rezulto: humaneco. Kaj ju pli teruran militon, korpodifektadon kaj suferon la estuloj praktikas unu al la alia, des pli rapide akceliĝas tiu rezulto. Ĉia sufero estas ja absoluta signo, ke oni elvokis kaŭzojn, kiuj kontraŭas al la mondplano, kaj ĉia vera bonfarto same neskueble estas signo, ke oni elvokis kaŭzojn, kiuj estas en kontakto kun la menciita plano, estas en harmonio kun la transformado de la terglobo al hejmloko de humaneco kaj perfekteco, kaj tial neniu estulo povas daŭre resti sen scio pri tio. La suferspertoj ja iom post iom amasiĝas en la konscio kaj formas precipe la antaŭe priparolitan "kartotekon", kiu je ĉiu momento decidas, kiamaniere ni konceptu aŭ sentu ĉian novan sperton. En la ĉiutaga vivo ĉia sperto estas sensebla nur pere de komparo kun la enhavo en la menciita kartoteko. Dependas de tiu kartoteko ĉu oni komprenas tion, kion oni vidas aŭ spertas. Kiel mi antaŭe priparolis, oni estas tute nekapabla rekoni ĉiun travivaĵon, al kiu oni ne havas analogan memoron. En tia okazo ĝi estas por ni tute nekomprenebla. Kaj tie, kie ni ne komprenas la aferojn, ni necese agas blinde. Kaj tie kie tiu mensa blindeco ekzistas kiel bazo por niaj volo kaj agmaniero, tie ni kompreneble el kosma vidpunkto ne scias, kion ni faras. Kaj ĉar ekskluzive nur tie ni povas agi kontraŭ la mondplano, kontraŭ la humaneco, ĉia malhumana ago en la realo povas estiĝi ekskluzive nur kiel produkto de nescio. Kaj estas la kompreno pri tio, kio transformas nin al humanistoj. Kiam same kiel Kristo oni komprenas, ke oniaj persekutantoj aŭ ĉiuj estuloj, kiuj praktikas malhumanecon aŭ alivorte antipation, koleron,

persekuton, malamon kaj venĝon kontraŭ oni, agas komplete en mensa blindeco aŭ nescio, do tio ja forigas la veran akrecon en ilia agado al ni. Tiam oni komprenas, kiel malsaĝaj estas ĉiaj indigno, malamo kaj venĝo kontraŭ tiaj estuloj. Kaj tial oni ne koleras kontraŭ tiaj estuloj, same kiel oni tion ne faras al eta senhelpa infano en la lulilo aŭ kontraŭ aliaj mense neplenkreskaj estuloj, al mensmal-sanuloj kaj mensreduktitoj. Kaj ĝuste surbaze de tiu konscistato la plej aĝaj aŭ plej grandaj saĝuloj de la homaro predikas la preskribojn, ke oni ne juĝu, ne venĝu aŭ alimaniere kaŭzu suferon al estuloj, sed ke oni alturnu la dekstran vangon post frapo sur la maldekstra kaj entute amu sian prok-simulon kiel sin mem. Surbaze de tiu konsciŝtupo tiuj preskriboj estas manifestitaj, kaj ĝi konstituas la en la Biblio priparolitan “sanktan spiriton”, kiu en mia ĉefverko Livets Bog estas esprimita kiel “kosma konscio”.

## 15. Tra evoluo de la kapablo kompreni kaj pardoni iras la vojo al “kosma konscio”

“Kosma konscio” do estas la samo kiel “la preta menso” de la tera homo, tiu menso, kiu estas la celo en la granda kreoprocezo aŭ la transformiĝo de la tero, tiu mensa evolustadio, kiu, kiam la plimulto de ĝiaj individuoj posedas ĝin, ĝuste faras la homaron kapabla kompreni la mondplanon kaj per tio esti en kontakto kun la granda kreoprocezo mem kaj administri kaj dividi la abundajn vivproduktojn kaj doneblecojn de la tero laŭ tia maniero, ke neniu plu malsatos aŭ sufereros pro malvarmo, neniu plu sentos inklinon rabi aŭ ŝteli de aliaj, neniu plu mortos pro mizero aŭ superfluo, same kiel tiu konscistato estas esprimo de tiel granda kaj ampleksa mensa kartoteko, ke pere de ĝi la individuo kapablas senti ĉiujn okazaĵojn de la vivo kiel de la Providenco superabunde aranĝitan instruprocezon, kiu tra la memorformiĝo neeviteble kondukas ĉiujn estulojn al la rekono de la granda rezulto: “Ĉio estas tre bona”, aŭ rekono de la identeco de la mondplano kiel kulminanta amo, manifestita tra ĉiu viva estulo sendepende de tio, kiel ajn ĝi aspektas, kion ajn ĝi pensas, aŭ kiel ajn ĝi eventuale agas. Ĉiu moviĝo, ĉiu vibro, ĉiu ago estas manifestado de Dio, estas lumo kaj amo kaj sekve kreado de bonfarto por ĉiuj vivaj estuloj. Vere, esti en kontakto kun tiu kreado, tio estas plenumo de la plej granda evangelio de la vivo aŭ realigado de la brila kristnaska mesaĝo de la anĝeloj: “Paco sur la tero”.

Tial nia plej sincera deziro por ĉiuj teraj homoj do devas esti, ke kiel eble plej rapide ili lernu kompreni ĉion, kion hodiaŭ ili malŝatas, ĉion, kion nuntempe ili inklinas persekuti, ĉar kun la vera kompreno ili povas nur pardoni tiujn estulojn, kiuj laŭ ilia opinio agis malĝuste al ili, tiujn estulojn, kiuj kalumniis ilin aŭ eĉ laŭ fizika vidpunkto eĉ detruis ilian vivofeliĉon. Nur per la trejnado pri pardonado malfermiĝas la vojo al “kosma konscio”. Sed ĉar oni ne bezonas tiun trejnadon sur tiuj kampoj, kiuj havas onian plenan simpation kaj amon, ĉar ĉi tie ĉio ja estas jam pardonita, oni sekve povas malfermi la pordojn de la ĉiela regno nur per sia amema brakumo al ĉiuj siaj malamikoj. Estas ĝuste, ke tio ne estas facila, kaj ke eble ili tute ne tolerus aŭ komprenus tian ĉirkaŭbrakon, sed tio ja ne povas malhelpi al ni fari tion en niaj pensoj.

Ne ekzistas malamiko, kiun ni tiamaniere ne povas preni al nia koro kaj per tio liberigi nian luman spiriton de la malhelaj makuloj, kiuj hodiaŭ malhelpas al ĝi senti la akompanadon de la eterna Patro tra sferoj kaj zonoj, tra tempo kaj spaco, por eterne.

El la dana originalo *”Kosmisk bevidsthed”,* 2-a eldono, 1967. Traduko Ib Schleicher

# Notoj

## Aliĝu al la Tria Skandinava Kongreso!

Ni ŝatus rememorigi pri la Tria Skandinavia Kongreso, kiu okazos **de la 27-a ĝis la 29-a de majo.** Vi trovos pli da informoj ĉe esperantonordio.org. La limdato por aliĝi estas **la 5-a de aprilo**, kaj bonvolu aliĝi kaj pagi samtempe se vi partoprenos.

## Ukrainaj rifuĝintoj

La prezidanto de Dana Esperanto-Asocio, Peter Wraae, registriĝis ĉe la Ruĝa Kruco kiel helpanto/organizanto por ukrainaj rifuĝintoj kiuj parolas Esperanton. Se iuj membroj de DEA estas pretaj helpi laŭbezone, bonvolu skribi al li ĉe peter@wraae.dk.

---




# Eo-semajno en Martinus-Centro Klint, Danio

Inter sabate la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto 2022 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos lingva instruado pri la internacia lingvo Esperanto, post tagmeze estos konversacia rondo. En la vespero estos interpretita prelego aŭ distra programo, ankaŭ estos teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen.
Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

**Pri la kosmologio de Martinus**
Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
Ĝi povas mo vigi op misman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpa aj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.

Laŭ la analizoj en La Tria Testamento ”ĉio estas tre bona” el eterna perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
La kosmologio igas ”alturni ankaŭ la alian vangon” kaj ”ami sian proksimulon kiel sin mem” scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.

## INFORMO PRI MARTINUS INSTITUTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la dana verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton.

La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100 Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk, esperanto@martinus.dk, shop.martinus.dk
Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



## SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.
Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron.
Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Martinus-Instituto
Mairendalsvej 94-96,
DK-2000 Frederiksberg,
Kopenhago,
Danio